



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2012 numero 3-a: aŭgusto- oktobro 2012
dissendo je la 17a de aŭgusto



La klifoj de Moher ĉe la maro en Irlando

Mirindas kaj imponas tiuj rokoj, tiu malpleno preter la migradvojo kaj sube la maro, la senfina maro. Sala akvo ŝaŭmas ĉe la rokoj, sed tiu minerala aktiveco apenaŭ aŭdeblas el la herbejo supra. Kelkfoje en la marondoj ni ekvidas ion moviĝanta, ion viva. Laŭdire estas delfenoj !

Kaj inter la maro kaj ni, en tiu vertikala malpleno flugas mevoj. Flugas kaj krias, miaŭas mevoj, ŝajne ankaŭ ludas mevoj per la vento. Mi kuŝas surventre en la herbo borde de la klifo kaj rigardante rokojn malsupre mi vidas aliajn mevojn, etajn, grizajn en siaj nestoj. Kaj proksime rondflugante grandaj blankaj iras nutri siajn mevidojn, kaj kelkfoje kuraĝigi ilin per bekŝovo por ekflugi la unuan fojon.

Luc Allemand.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard kaj Martine Schneller

Redaktaj datlimoj

2012-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2013-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.

2013-2 : marto-junio :
februare 10, dissendo 1-an de marto.

2013 3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Münger, Rue Centrale 4, 2112
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Kontonumeroj de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Ĉefa konto 17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

VASTE kaj DIGNE 12-128564-4
(por subteni informadon-varbadon)

Komisiito pri financoj : Hans-Werner
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch



Tutsvisa aktiveco

2012-3 • Redaktis : Claude Gacond



Festado de la 125a jariĝo de esperanto je la sabato 1-a de septembro en La Chaux-de-Fonds

Antaŭ 125 jaroj, dum la somero 1887, Ludoviko-Lazaro kaj Klara Zamenhof-Zilbernik dissendis el Varsovio en la lingvoj rusa, pola, germana, franca kaj angla sian projekton de *Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto*. Tiel fakte naskiĝis la lingvo nomota *Esperanto*.

Ni digne festu tiun 125an naskiĝjaron de esperanto en la somera finiĝanta kongresa periodo je la 1-a de septembro en La Chaux-de-Fonds, ĉar tie ekzistas preciza scio, ke en tiu urbo la horloĝ-fabrikisto Philidor Wolf eklernis la Lingvon Internacian jam en la tiama somero 1887 per specimeno de la broŝuro nun nomata *La Unua Libro*, kiun Zamenhof mem estis sendinta al la rabeno de la sinagogo. Philidor Wolf verŝajne estas la unua esperantisto de Svislando. Poste li instruis esperanton al sia filo Jules naskiĝinta ankaŭ en 1887. Jules estas do verŝajne la unua denaska esperantisto de Svislando. Tio indas esti festata kaj diskonigata.

Ambaŭ horloĝistoj Philidor kaj Jules Wolf poste vaste diskonigis la Lingvon Internacian kaj instigis siajn kolegojn doni esperanto-nomon al sia horloĝ-firmao. Dank'al ilia agado ekde tiam viglis la esperanto-vivo en la horloĝeja metropolo kaj mondfamiĝis la horloĝa firmao elektinta la nomon **Movado**.

Tiuj historiaj faktoj meritas esti digne kaj fiere diskonigitaj kaj festataj.

Krome ankaŭ en la jaro 1887 estis inaŭgurita la alveno de la akvo en La Chaux-de-Fonds dank'al ambicia teknika projekto de la avangardisma inĝeniero Guillaume Ritter. Necesis elpumpi fonto-akvon en la Gorĝoj de la rivero Areuse je alteco de 620 m por suprenigi ĝin al la alteco de 1120 m kaj poste kapabli ĝin fluigi al La Chaux-de-Fonds laŭ subtera kanalo pli ol 13 kilometrojn longa, tio en la Valo La Sagne. Tiu sukcesinta entrepreno vaste diskonigis tra tuta Eŭropo kaj famigis la modernismon de la montara horloĝeja metropolo.

Por festi tiun eventon estis starigita Granda Fontano komence de la Ĉefavenuo Léopold-Robert. Kaj kio interesas nin esperantistoj, tio estas foto de tiu inaŭguro aperinta en la libro *Point(s) d'eau* eldonita de la urbo en 2003. Ĝi ne nur atestas pri la festanta publiko, sed ankaŭ pri la ekzisto mem de la horloĝista entrepreno

de Philidor Wolf. Jen okazo rememorigi tiun eventon per publika grupiĝo kaj fotiĝo antaŭ la koncerna domo situanta ĉe la strato *Rue Neuve* n-ro 16. Tiu grupiĝo disvolviĝos post la komuna tagmanĝo kaj antaŭ publika koncerto okantonta en la Salono Charles Faller de la Konservatorio.



Malantaŭ la granda fontano kun festantoj pri la alveno de la akvo en 1887 videblas la ŝildo de la « **Fabrique d'Horlogerie Philidor Wolf & Cie.** ».

Eksterordinara fest-programo

Ekde la 10h00 : **Kafumada akcepto** de la alvenantoj en la CDELI-salono ĉe la Urba Biblioteko, strato Progrès 33, 2a etaĝo.

10h15-10h45 : Dum tiu kafumado kun la jam alvenintoj rapida **kunsido de la asocio de la Amikaro de CDELI** celos doni realan vivon al la asocio. Por tio necesas elimini el la statuta projekto la punktojn, kiuj antaŭvidas oficialan partoprenon de biblioteka reprezentanto en la asociaj okazaĵoj kaj kunvenoj.

11h00 : Grupiĝo en la aŭlo sam-etaĝa al CDELI.

11h15 : **Festa malfermo per prelegoj :**

Punto unu : Claude Gacond kun Luc Allemand : **La esperanto-fenomeno panorame**, rapida enkonduko al la sekvontaj prelegaj temoj.

Punkto du : D-ro Christoph Klawe (el Trier/Trèves, Germanio) : **Impresoj kaj esploroj pri la romano *Kiel akvo de l' rivero de Raymond Schwartz***. Li raportos pri la vivo de Schwartz kaj pri la enhavo de la romano, rakontos pri siaj travivaĵoj, kiam li klopodis trovi la ejojn, kiuj estas menciitaj en la romano, kaj montros fotojn de la vilaĝoj en Loreno, de la supozebla domo de la familio Geist en Berlino, ktp.

Ni konatiĝu kun d-ro Christoph Klawe :

Li naskiĝis en 1966 kaj unuafoje aŭdis pri esperanto, kiam li, kune kun du amikoj, kiel mezgradlerneja studento travizitis la muzeojn en Vieno kaj hazarde stumblis en la ĝis tiam al li nekonatan Esperanto-Muzeon, kie la afabla kaj kora gvidado per du maljunaj konservistoj ege impresis lin. Li decidis lerni esperanton, sed nur jardekojn poste realigis tiun ideon. Li studis medicinon en la universitatoj de sia hejmurbo Majenco (Germanio) kaj Dublino (Irlando) kaj kvalifikis sin kiel neŭrologo, psikiatro kaj psikoterapiisto. Nuntempe li loĝas en Treviro (Germanio) kaj tie estras grandan centron por la kuracado de gemalsanuloj, kiuj suferas de multobla sklerozo. Li estas edziĝinta kaj havas du infanojn. Flanke de siaj profesiaj devoj li ĉefe interesiĝas pri la japana kulturo kaj estas entuziasmulo pri la japana go-ludo kaj la luktarto aikido.

Punkto 3 : Dominique de Mestral (el Bofflens) : **La Infana Raso de William Auld**. Jen poemaro, kiu neeviteble fascinas ĉiujn, kiuj kuraĝas ĝin iom atente eklegadi. Dominique de Mestral travivis tiun aventuron, kaj kadre de beletra rondo li jam provis malkovrigi al aro da studemuloj la neimageblan riĉecon, kiun William Auld kaŝis en verko fakte inaŭgurinta novan etapon en la literaturo homarana, kiun iniciatis Zamenhof per la lanĉo de sia lingvo-projekto antaŭ 125 jaroj. Ni ekkomprenos kial.

Ni konatiĝu kun Dominique de Mestral :

Liaj studoj beletraj, lingvistikaj kaj primuzikaj ĉiam instigis lin al plua interesiĝo pri la lingvoj (latin-grekaj, franca, germana, angla), kaj al ekmalkovro de la rusa kaj itala, kaj nun al tiu de esperanto. Kaj esperantigo de poemoj estas ĉiam por li same riĉiĝo kiel ludo.

13h00 : Komuna tagmanĝo en la picejo Ital-panini.

Elekteblo inter du menuoj :

1. Vegeterana menuo : Mikssalato kaj kalelonoj « rilotta » kun spinacoj bake gratenitaj.
2. Vianda : Mikssalato kaj lasanjoj.

14h30 : **Grupa fotiĝo** antaŭ la domo de la tiama horloĝfirmao de Philidor Wolf ĉe Rue Neuve n-ro 16.

15h30-17h30 : **Publika koncerto** en la Salono Charles Faller de la Konservatorio

Antaŭkoncerta enkonduka momento :

1. **Skeĉo de la gelernantoj de "La Granda Ursino"** pri la 125jara lingvo **Esperanto**, kiun ili ĵus kreis por vi kun sia instruistino Monika Molnar dum migrada semajno sur la ĵurasaj montoj. (En la lernejo *La Grande Ourse* nova lerno-jaro ĉiam komenciĝas per semajna restado en la naturo. Do ĝis nun nur la ĵurasaj suproj havis la privilegion spekti la rakonton pri Zamenhof kaj Esperanto, kiun ili pretigis por vi. Bonan amuziĝon!).
2. **Transdono de diplomo al la sukcesintoj de la Tutmonda Lingvoekzameno**, kies skribas parto okazis la 9an de junio samtempe en 29 urboj de 17 landoj, inter ili ankaŭ La Chaux-de-Fonds.
3. **Koncerto**. La artistoj malkovrigos al la publiko kantojn el la repertuaro de la francaj melodioj, kies komponistoj kiel C. Debussy, H. Duparc, G. Fauré, L. Delibes, G. Bizet vivis en la tempo de L. L. Zamenhof (fino la 19a kaj komenco de la 20a jarcentoj). Jen romantikaj, jen humorplenaj, tiuj komponaĵoj valorigas tiom la pianan kaj voĉan parton, kiom la tekston. La publiko povos ankaŭ malkovri ciklon de melodioj originale skribitaj de la hungara-cigana poeto Julio Baghy kaj hungara komponisto M. Sarossy (baritono, soprano kaj piano). La koruso prezentos popolajn svisajn kaj nordajn melodiojn kun piana akompano.

Prezento de la artistoj:

Elisabeth de Mestral, soprano.

Ŝi ekkantis en preĝeja koruso kaj studis unue pianon kaj poste kanton en la konservatorio de Montreux. Paralele ŝi sekvis komercajn studojn kaj pludaŭris

siajn muzikajn studojn en la profesiaj klasoj de la konservatorio de Ĝenevo. Ŝi prefektiĝis sekvante staĝojn pri renesanca muziko en Francio, lidoj en Vieno (Austrio), iĝis solistino por pluraj korusoj aŭ ĉambr-orkestroj kaj koncertas en preĝejoj kaj diversaj okazaĵoj. Ŝi ankaŭ direktis la koruson "Caecilia" en Montreux. En 2007 ŝi kreis la esperantan svisan koruson.

Lorris Sevonkhian, piano.

Li studis kaj akiris pianan virtuoza diplomon en la konservatorio de Fribourg. Paralele, li ankaŭ diplomiĝis pri muzikteorio kaŭ instruas nun en la konservatorioj de Montreux kaj Morges por komencantoj ĝis profesia nivelo. Li ankaŭ registris plurajn diskojn (Chopin, Moussorsky, Schumann, Liszt, ktp.) kaj regule koncertas. Li ankaŭ aktivas en pentraĵo kaj ekspoziciis plurfoje siajn akvarelojn.

Jean-Thierry von Büren.

Jean-Thierry von Büren sekvis kursojn pri solfeĝo, bekfluto kaj piano en la Muzika Lernejo de la familio Pantillon en La Chaux-de-Fonds. Poste li daŭrigis la studadon de piano kun profesoro C. Berset, de transversa fluto kun profesoro J. Marthaler, de korusgvidado kun profesoro J. Mortimer kaj de solkanto kun profesoro Chs. Ossola, tio en la konservatorioj en La Chaux-de-Fonds kaj Neuchâtel. Li kantas kiel bas-baritono en la korusoj Bach en Berno (dir. Th. Loosli) kaj Da Camera en Neuchâtel (dir. Ph. Huttenlocher), kaj kiel plifortiganto en aliaj korusoj. Li efektivigis kant-recitalojn kiel solisto en Svislando, Italio kaj Litovio.

Aliĝo al la festa programo

La partoprenkosto al la festo estas fr 40.-.
Ĝi inkludas la komunan manĝon (sen la trinkaĵoj).

Por aliĝi sufiĉas pagi tiun sumon de fr 40.- al la konto 17-581908-4 de Svisa Esperanto-Societo per la pagilo aldonita al la bulteno, **indikante tre legeblasian nomon** kaj :

Aliĝo al la festo kun menuo vegeterana
aŭ

Aliĝo al la festo kun menuo vianda.

Okaze de pago por pluraj personoj, klare indiki iliajn nomojn kaj la elektitajn menuojn.

Tiuj pagoj al la konto de SES okazu kiel eble plej rapide.

Surloka aliĝo tamen eblos, sed la pago altiĝo al fr 50.-

Pri la sekvaj aranĝoj
Jen atentigo pri postaj aranĝoj

**Postsomera renkontiĝo je la sabato 8a de septembro
organizita de Mireille Grosjean**

**Dinosaŭraj spuroj en Oberdorf (SO)
kaj ŝipveturado de Soloturno al Bielo**

La dinaŭsora aventuro

Rendevuo en Soloturno je la 10h15 en la stacidomo.

Je la 10h32 ekveturo trajna el Soloturno al Oberdorf.

Je la 10h45 ni atingos Oberdorf. (Veturdaŭro 13-minuta).

De tie ni migros tra belega arbaro laŭ nedekliva vojo al loko, kie observiĝas dinosaŭraj spuroj. (Daŭro de la marŝado : inter 30 kaj 45 minutoj).

Ni revenos laŭ la sama vojo al Oberdorf (proksimume 30-minuta migrado), kie ni trafos trajnon (je la 12h46 aŭ 13h10 aŭ 13h46, tio laŭ la tempo, vetero aŭ emo) kaj trajnos al Soloturno (ree 13-minuta veturado).

Vizito de la urbo eblos post nia alveno al la stacidomo.

La ŝipa ekskurso

La ŝipo startas el Soloturno je la 15h15 ĉe la kvinflanka turo kaj atingas Bielon je la 18h05. Temas pri trihora agrabla ŝipveturado sur la rivero Aare.

Partoprenontoj povos rendevui en la soloturna stacidomo je la 10h15.

Alia eblo estas alveni nur por la urba vizito je la unua aŭ dua horo : per poŝtelefono ni povos informi unu la alian, kie ni troviĝas.

Alia eblo estas enŝipiĝi je la tria horo en Soloturno.

Ĉiu mem pagos sian trajn- aŭ ŝip-bileton kaj kunportos piknikon. Sed ankaŭ eblos manĝi en Soloturno en iu restoracio.

La poŝtelefona numero de Mireille Grosjean, la organizanto, estas 079 69 709 66.

Estos bona okazo renkontiĝi kaj revidi Mirejon, kiu revenos fine de aŭgusto el kvarmonata azia restado.

-oOo-

SFERO

Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo 19-21-aj de oktobro 2012
ĉe la gastejo Le Louverain en Les Geneveys sur Coffrane
Neŭŝatela kantono, Svislando
www.esperanto.ch/sfero

La alirvojo el Neuchâtel kaj el La Chaux-de-Fonds al la gastejo Le Louverain estas en la retpaĝo de la domo **www.louverain.ch**. - En la vilaĝo Les Geneveys-sur-Coffrane troviĝas indikiloj. La vojo al la domo estas dekliva kaj du kilometrojn longa. Pro la sezono indas havi vintrajn pneumatikojn. La domo staras je mil metroj super marnivelo en la ĵurasa montaro.

Kiuj alvenos trajne, tiujn ni veturigos aŭte al la domo. Bonvolu voki Mirejon telefone : 079 69 709 66. Per blogo de Mirejo oni povas kvazaŭ viziti la domon, kie ni restados en oktobro. Tiu blogero nomiĝas LE LOUVERAIN, mirejo3.blogspot.com.

En tiu renkontejo estas je dispono piano en la granda salono, du porinfanaj seĝoj kaj grandega salono. Ne ekzistas litoj por beboj. Mirejo alportos diversajn kusenojn kaj lignan trajneton. Etaj infanoj povos ludi kaj kuradi.

La planitaj aktivecoj estas : migrado en la arbaro, observo de arboj, bestoj, kolektado de folioj, ludoj.

Sabate okazos studsabato en CDELI en La Chaux-de-Fonds ekde la 10h30 ĝis la 16h30. La plenkreskuloj povas aliĝi al ĝi kaj organizi veturadon tien. Ili sin anoncu ĝis la antaŭa mardo.

Okazos paralele staĝo de la GRUNDTVIG-projekto, kunveno de plenkreskuloj el eksterlando kun labortemo «interkultura edukado».

Kompreneble viziteblas muzeoj en La Chaux-de-Fonds (20-minuta veturado) kaj en Neuchâtel (ankaŭ 20-minuta veturado). Tiuj vizitoj ne estos planitaj, nek repagitaj, nek inkluzivitaj.

Prezoj (en svisaj frankoj)

Tuta renkontiĝo (vendredo - dimanĉo) en 2-lita ĉambro :

- plenkreskuloj Fr 200.- ; bebo senpage, infano ĝis 6 jaroj Fr 100.- infano 6-12 jaroj Fr 150.- Por ĉiu infano SES transprenos Fr 50.- por redukti la fakturon de la familioj.

En tiuj prezoj estas inkluzivitaj :

Vendrede : Vespermanĝo/Tranokto.

Sabate : Maten/tag/vesper-manĝoj/Tranokto.

Dimanĉe : Maten/tag-manĝoj.

Programo. Taksoj.

Oni povas aliĝi sub :

www.esperanto.ch/sfero/alighilo.html aŭ per **sfero@esperanto.ch**

-oOo-

Prelegos sinjoro Privas Tchikpe el Benino
En Berno je la sabato 1-a de decembro
Allresto Bern, Effingerstrasse 20, 3008 Bern
Je la 11h00, komuna manĝo je la 13h00

Privas Tchikpe estas oficisto en la ministerio pri laboro en Kotonuo. Li estas esperantisto el Benino, la unua esperantisto en tiu afrika lando. Li studis kaj diplomiĝis en la universitato de Abomey-Calavi pri juro, merkatico kaj komunikado. Li esperantiĝis en 1981. Poste li partoprenis kun 12 aliaj afrikanoj en la jubilea Universala Kongreso en Varsovio en la jaro 1987. En 2009 li fondis kun Mireille Grosjean strukturon, kiu nomiĝas "Scio Sen Bariloj" (SSB), neregistaran organizon, kiu laboras por ebligi aliron al lertigado. Kerna agado de "Scio Sen Bariloj" estas interalie la disvastigo de esperanto. SSB havas UEA-konton assb-k kaj Postfinance-konton en Svislando 10-752700-3.

La prelego de s-ro Privas Tchikpe traktos jenan temon : Komunikado ĝenerale kaj komunikado pri esperanto: Trafe kaj efike komuniki estas malfacila arto. Ĝi okazos je la 11a horo kaj la partoprenantoj povos kune manĝi post ĝi, proksimume je la 13a horo.

Organizanto : Mireille Grosjean, kun-prezidanto de SES

-oOo-

Recenzo

Pri la *Konversacia vortaro* de Andreo Cseh
Nova eldono en 2010 de Internacia Esperanto-Instituto
Claude Gacond

En mia instruado al komencantoj unu el miaj laboriloj estis la humurplena *Konversacia Vortaro*, kiun Andreo Cseh verkis kun siaj gelernantoj. Tiu jam delonge elĉerpita kaj mizeraspekta libreto aperinta en la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento multe helpis min por paroligi esperanto-komencantojn. Ĝi evitis la utiligon de traduk-vortaroj, kiam instruatoj petis vortsignifon. Tiam la simplaj kaj spritaj difinoj de tiu libreto facile komprenigis la sencon de duon-milo da vortoj plej ofte renkontataj en facilaj tekstoj. Do sen la interveno de krokodila klarigo la konversacio aŭ la legado povis plue disvolviĝi. Por la vortoj netroveblaj en la vortareto, mi aŭ aliaj konversaciantoj imagis klarigon laŭ la Cseh-maniero.

Kiam infano informiĝas pri la signifo de vorto, fakte oni ne respondas al li per alilingva traduko. Same mi ŝatis instrui esperanton restante en la instruata lingvo por la vort-klarigoj. En la plurlingva Svislando la gelernantoj ĝenerale estas diverslingvaj. Kaj kadre de la kursoj ĉe Kultura Centro Esperantista, kiujn mi gvidis dum trideko da jaroj, ne povis funkcii traduklingva instruado al la komencantoj alvenintaj el plej diversaj landoj. Mi do fakte troviĝis en la instru-situacio de Andreo Cseh : komprenigi vort-signifojn per kiel eble plej simplaj rimedoj seeble humurplenaj. Komikaj ekzemploj faciligas la vort-asimiladon.


Mi citu kelkajn el la vortklarigoj komprenigaj kaj ofte spiritaj imagitaj de Andreo Cseh :

abonas : antaŭpagas gazeton ; **adreso** : vortoj sur koverto ; **koverto** : vesto de letero ; **aŭskultas** : malfermas la orelojn ; **benko** : longa seĝo ; **blovas** : faras venton per la buŝo ; **brako** : la parto inter la trunko kaj la mano ; **trunko** : la dika parto de la korpo ; **vejno** : sang-rivero en la korpo ; **vetero** : la plej grava objekto en konversacio ; **sufikso** : vorteto post radiko, ĝi faras novan vorton.

Mi ĉiam bedaŭris ne plu povi instigi la esperanto-instruantojn, kiujn mi formis, al akiro de tiu tiom utila *Konversacia Vortaro*. Sed nun ĝi reaĉeteblas sub la formo de plaĉa 110-paĝa sprite ilustrita verko. Kiel diras ĝia enkonduko, al la 479 vortklarigoj de Andreo Cseh aldoniĝis 134 novaj same simple kompreneblaj. Laboris al tiu riĉigo kaj al la bildigo de la nova sesa eldono de tiu vortaro aro da Cseh-pedagogoj el diversaj kontinentoj kunvenintaj en 2008 en Hago en la IEI-oficejo. Kaj Ed Borsboom en preciza enkonduko detale klarigas pri la plibonigoj, kiuj estis alportitaj al la renaskiĝinta vortaro, kiu certe ree alportos utilan helpon al ĉiuj, kiuj provas konversaciigi komencantojn sen tradukrimedoj.

Deko da vortklarigoj estas eble nefacile kompreneblaj al nesekvintoj de Cseh-metoda kurso, ĉar ili aludas al la didaktikaj objektoj propraj al tiu metodo. En sekva eldono aliaj klarigoj povos anstataŭe enkondukiĝi sen malriĉigi tiun vortareton kaj sen misefiki al la pedagogio inspirita de Andreo Cseh, kiu ne nepre dependas de kelkaj tipaj pedagogiaj iloj. Paroligaj kunvenoj pli kaj pli grupigas komencantojn ofte mem eklernintaj la lingvon per aliaj lern-rimedoj, ol la Cseh-metodaj, inter kiuj reliefiĝas la interretaj. Gravas antaŭ ĉio povi konversaciigi tiujn novulojn kaj mi ĝojas, ke nun la *Konversacia Vortaro* ree povos plenumi sian helpan rolon eĉ ekster la Cseh-metoduloj.

-oOo-



Kongresen

Esperanto en Fonduso Internacia por la Protektado de Artoj Militaj (FIPAM)

Mireille Grosjean

Kiu traduko estas la plej bona por la japana esprimo *BUDO*? Ĉu militartoj, batalartoj, luktartoj... Mi hezitas... Sed tio ne estas mia temo hodiaŭa.

La FIPAM ĵus naskiĝis kaj planis unuan kolokvon kun la temo « Perfortoj, socioj kaj luktartoj ». En la kerna grupo estas esperantisto, kiu proponis, ke nia lingvo aperu en la kolokvo. Ŝi ekrilatis kun gesamideanoj en Francio por esplori, kiu povus prelegi pri tiu temo. De pluraj personoj venis la indiko: *Tio estas temo por Mireille Grosjean*. Certe pro la fakto, ke mi praktikis aikidon dum 15 jaroj, atingis la nivelon de nigra zono kaj instruis konflikto-solvadon dum 10 jaroj al gejunuloj.

Komence de aprilo 2011 mi povis prelegi pri esperanto kadre de kolokvo de FIPAM en Parizo. Unue mi rapide prezentis mian lingvon, por ke homoj sciu, pri kio ni parolas. Due mi klarigis la ligojn inter aikido kaj Oomoto, japana eklezio ŝintoismeca. Fondintoj de ambaŭ grupoj vivis kune kiel fratoj dum ĉirkaŭ 20 jaroj. Mi jam antaŭe esploris pri tiuj ligoj kaj pridemandis la historiistojn ĉe Oomoto en Ajabe kaj Kameoka en Japanio dum mia sesmonata restado en 2008-2009. Notindas, ke Oomoto enkondukis esperanton en la jaro 1923, do precize dum tiu intensa kunlaboro kun la fondinto de aikido. En mia tria parto mi traktis la kolokvan temon en rilato kun mia instruado dum 38 jaroj: pro respekto mi alvenis akurate, mi preparis interesajn kursojn, mi traktis atenteme la devigan programon. Tion rimarkas la gelernantoj kaj naskiĝas reciproka respekto kaj harmonio. Pri la praktiko de batalartoj mi substrekis, ke nuntempaj gejunuloj volonte iras al tia hobbio pro la fakto, ke luktartoj estas ekzotaj, konsekvence havas prestiĝon. Paralele kun sia kutima ribelemo kaj provokemo gejunuloj pretas obei en la trejnejo, forpreni siajn ŝuojn en ĝusta loko, sekvi la ĝentilecajn regulojn tute japanecajn. Tio havas fortan edukan efikon, se la instruistoj, majstroj, havas bonan nivelon kaj mem daŭre plu studas kaj pripensas pri sia arto.

-oOo-

Al Irlando kaj al Slovakio

Luc Allemand

Ĉi-somere mi ne partoprenis la kongresojn de UEA, kiuj okazis malproksime en Vjetnamio ; mi restis en Eŭropo por partopreni du aranĝojn iom malpli gravajn mondscale sed tamen tute indajn. Unue la **kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio** (EEU) okazinta en **Galivo** (Irlando) kaj due **Someran Esperanto-Studadon (SES)** okazinta en **Nitra** (Slovakio).

Fakte estis Marek, unu ĉeĥa amiko, kiu lastjare donis al mi la ideon partopreni tiujn du renkontiĝojn, dirante ke ankaŭ li ne iros al Vjetnamio. Nia somero do planiĝis dum la jaro kaj ni decidis troviĝi kelkope en Irlando kaj sekvan semajnon vojaĝi kune al Slovakio. Kaj jen la plano ĝoje kaj iom aventure efektiviĝis.

Irlando (Eireann en la irlanda lingvo)

Dimanĉo la 15-a de julio 2012 : Ĝenevo – Dublin.

En la insula flughaveno mi retrovas jam kelkajn esperantistojn, sed mi lasas ilin veturi sen mi al Galivo, ĉar laŭplane mi atendas Barbara, kiu alflugos el Germanio nur vespere. Atendante jen okazo viziteti Dublinon.

Poste buso transportas nin el la oriento al la okcidento de la insulo, al nia kongresa urbo. Nuntempe plej konate en la angla ĝi nomiĝas *Galway*, origine en la irlanda-gaela lingvo *Gaillimh* prononcata « *galiv* » kaj en esperanto *Galivo*. Ĉar la nunaj irlandanoj klopodas konservi sian kulturon, ĉiuj lokŝildoj estas skribitaj kaj en la angla, kaj en la irlanda.

Nia junulargastejo nomiĝas *Kinlay Hostel*. En ĝi ni estas registritaj sub la nomo « ESPERANTO ». Efektive, Maja, kiu rezervis ĉambrojn por ni tie, anoncis nin ĉiujn sub tiu nomo. En ĝi ni ricevas matenmanĝon, kaj aliajn manĝojn ni povas mem kuiru uzante kuirejon je dispono por la gastoj. Nia esperantista komunumo loĝanta ĉi-tie plurfoje ĝuas tiun eblon por kune kaj pli ŝpare manĝi.

En tiu gastejo ĉefe gastas junuloj. La esperantistoj estas interalie Marteno kun sia patrino Maria el Slovakio (li tamen loĝas en Londono), Nico el Nederlando, Ekaterina el Rusio, Lode el Belgio, Marek el Ĉeĥio, Barbara el Germanio, kaj mi el Svislando. Do ŝajne ne du homoj loĝantaj en la sama lando, amuze !


Al la kongreso partoprenas ĉirkaŭ 160 homoj, inter ili du svisoj : Bruno Graf kaj mi.

Plurfoje prelegas la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio s-ro Seàn Ò Riain. Kiel prezidanto li kondukis la solenaĵojn kaj oficialaĵojn, kaj kiel klera irlandano li prezentas interalie historion de Irlando kaj donas bazan kurson de la irlanda-gaela lingvo.

Zlatko Tišljar prezentas Tibor Sekelj kadre de la jaro dediĉita al li. Kiajn aventurojn li travivis kaj kia homo li estis, kun tiom da scivolemo, kuraĝo kaj volo !

Mi ne citos ĉiujn prelegantojn, sed videblas, ke la ĉefaj temoj estas la lingvo-problemoj en Eŭropo kaj la lingvolernado kun la celoj lerni pli kaj kosti malpli.

En iu prelego oni mencias specife la lingvoproblemon en Irlando pri la konservado de la irlanda-gaela lingvo paralele al la uzo de la angla.



La du svisoj : Luc Allemand kaj Bruno Graf

Laŭ mi tamen plej interesaj (aŭ plej ĝuigaj) estas la vesperoj, kun la koncertoj de JoMo kaj de Georgo Handzlik, kaj kun teatraĵo de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik « *Kompleta historio de Universalaj Kongresoj* ».

Estus bedaŭrinde esti venintaj al Irlando sen viziti kelkajn geografie pitoreskajn lokojn de tiu lando. Plej menciindaj certe estas la famaj klifoj de Moher. El Galivo oni buse veturas dum du horoj tien, kaj alvenas en turismega centro. Feliĉe eblas facile fuĝi la butikojn kaj la betonajn kaj turist-protektigajn piedvojojn por alveni post 20 minutoj sur iom pli sovaĝa vojeto supre de la klifo. [Sub la foto de la kovril-paĝo vi certe jam legis, kiel bele Luc rakontas siajn impresojn.]

Vendredo la 20-a estas nia lasta tago en Irlando. Post reveno el la ekskursoj Barbara, Marek, Marteno, Maika, Nico kaj mi retroviĝas en la gastejo. Ni jam ne plu havas ĉambron tie, sed ankoraŭ rajtas resti en la salono atendante la horon de nia busa foriro, je la 1-a horo en la nokto. Iom antaŭ noktomeze ni iras satiĝi kaj

pasigi tempon en apuda usona picejo, kaj revenas en la gastejon por ripozi, preni
niajn pakaĵojn, kaj ek al la busstacio.

Slovakio

Dublin, la suno leviĝas. Marteno kaj Nico adiaŭas nin en la flughaveno, ili
veturas alidirekten. Kvarope ni daŭrigas nian vojaĝon flugante al Budapeŝto
(Hungario). Ĉu dormas la kapo en la manoj aŭ kontraŭ la seĝo, ĉu dormas en
alia pozicio, ĉu eĉ ĝi dormas? Ĉiukaze kiam finfine ni alteriĝas kaj la senĉesa
ronkego de la motoroj ĉesas, ni troviĝas kelk-miloj da kilometroj for.

La klimato pli varmas, la domoj aspektas alie, la homoj parolas alian lingvon.
Tamen mi ne havas impreson esti vojaĝinta. Ni simple flugis, ŝajnas al mi, ke mi
estis kvazaŭ elŝutita de iu loko por esti alŝutita al alia loko sur la Tero. Stranga
sento.

En Budapeŝto ni per urba buso kaj per metroo atingas stacidomon, kaj de tie
trajnas al Slovakio. Ni ĝojas, ke Marek, parolante pli-malpli ĉiujn lingvojn de
Eŭropo, gvidas nin kaj aĉetas por ni la necesajn transportbiletojn. Nian celon
Nitra ni atingas vespere, ĵus antaŭ la verpermanĝo.

SES (Somera Esperanto-Studado) okazas en universitataj konstruaĵoj
disponigantaj dormoĉambrojn, klasoĉambrojn, manĝejon kun kuiristoj, grandan
salonon, drinkejon kun diskoteko, sportejon. Ĉio por ke la 250 partoprenantoj
povu diligente studi matene kaj moĵose* ĝui la renkontiĝon posttagmeze kaj
vespere. Kun granda ĝojo mi retrovas amikojn kaj amikinojn, kiujn mi, por
kelkaj, vidis lastfoje antaŭ tri jaroj.

SES estas fizika renkontiĝo de la reta e-lernejo *lernu.net*. Ĝi estas organizita
de E@I (esperanto aŭ edukado ĉe Interreto), kies kunordiganto estas Peter
Baláž. Ĝi ne estas rezervita al junuloj, do partoprenas homoj de ĉiuj aĝoj inter 4
kaj 65 jaroj. Tamen la organizantoj kaj plej multe de la partoprenantoj estas
junaj, do la etoso estas juneca. Tiurilate la unuan vesperon okazas la tradicia
interkona vespero laŭ juna (kaj amuza) stilo.

Oni venigis hungarajn kaj alidevenajn eminentajn instruistojn por gvidi
kursojn al dek grupoj laŭ la nivelo de ĉiu. La dek-unua klaso gastigas
seminaron nomata *Flugiloj de malfacila vento*, kie oni lernas didaktikon kaj
instrumetodojn de esperanto.

Tiun seminarion mi sekvas kun ĉirkaŭ 12 aliaj homoj. Xosé Conde el Hispanio
(Galegio) ĝin gvidas kun la helpo de Konstantin Tiĥomirov, kiu alportas
gramatikajn komplementojn, klarigas lingvajn tiklaĵojn, sin apogante sur la libro
de Bertilo Wennergren *Detala Gramatiko de Esperanto*.

Ĉiu-matene ni studas de la 9-a ĝis la 13-a, kaj la posttagmezoj estas dediĉitaj al
aliaj aktivecoj, laŭ la taga temo. Foje estas *Lingvo-Tago*. Tiam okazas fulmo-
kursoj de la slovaka, rusa, franca, pola lingvoj, kaj eĉ de la lingvo *toki pona*. Ĉi-
lasta estas planlingvo kreita en 2001 de iu Sonia el Kanado. Ĝi estas lingvo de

simpleco, kies vortaro konsistas nur el 120 vortoj, do ne eblas paroli precize per ĝi, sed ĝia celo ĝuste estas pensi pli simple kaj kontentiĝi de la esenco sen superflujaj precizigoj. Fakte la plej multo de la *toki pona*-parolantoj jam estis esperantistoj.

La 26-a de julio kompreneble estas la *Esperanto-Tago*, okaze de la 125 jariĝo de nia lingvo. Do vespere ni tiu-rilate festas, ludas kvizon kaj rigardas filmon pri esperanto kaj ties historio. Ni eĉ kantas la himnon *La Espero*, kvankam ĝi ne estas tiom populara en la junularo. Kaj nokte, same kiel la aliajn noktojn, oni dancas kaj drinkas en la diskoteko.

Kelkfoje ankaŭ, tage aŭ nokte, kiam varmas kaj emo venas, oni ludas akvobatalon per akvo-pafiloj. Tiom mojose* !

Aliajn aktivecojn, kiujn mi ne detale priskribos sed kiuj donas plezuron kaj bonigis la etoson, estas interalie vingustumado, koncertoj de Georgo Handzlik kaj de JoMo (kiel lastsemajne), internacia arta vespero kun neforgesebla prezento de Tim Morley de la brita ludo *Ĉevalo*, ekskurso al minejo de proksima urbo Banska Štiavnicka... Foje ni migras sub varmega suno, sed feliĉe en arbaro, al la monto Zobor. Similas al montgrimpado, kiun oni povus fari en Svislando en Ĵuraso, sed malgrande : efektive, ni ekas de 150 metroj kaj alvenas je 500 metroj super la maro.

Dimanĉe la 29-an oni disiĝas fininte la semajnon, foriras ĉiu al sia plua direkto kaj jam baldaŭ sentiĝas la kutima post-esperanto-renkontiĝo-sindromo.

Rikardo kaj mi kune vojaĝas al Svislando. Buso al Bratislava, alia al Vieno. Kelkhora urbumado de la aŭstra ĉefurbo, kaj je 22.30 ni entrajniĝas en nokta trajno al Zuriko.

La vorto **mojosa (aŭ **mojose**) ne estas en PIV, almenaŭ ne en malnova eldono, ĉar ĝi estas nova vorto. Tamen ĝi nun estas oficiala kaj sufiĉe konata (ĉefe ĉe la junularo). Estas fakte mallongigo de "modern-jun-stila" kaj ĝi signifas ion kiel "cool"; kun bona etoso por la junuloj.*

-oOo-

60a ILEI Konferenco, julio 2012, Kunming, Ĉinio **Mireille Grosjean**

La urbo Kunming situas preskaŭ je 2000 metroj super la marnivelo ; pro tio la klimato estis plej agrabla kaj milda. La kongresejo estis Kolegio pri Artoj, tre taŭga loko kun multaj ejoj kaj vastaj ĉambroj. La domoj situas en granda parko kun lagetoj ornamitaj de lotusoj, kiuj abunde floris. La diversaj artstudentoj de la Kolegio partoprenis niajn diversajn aktivecojn, kiel malfermo kaj fermo, kaj akceptofesto brila kaj bunta. La direktoro de la Kolegio partoprenis diversajn debatojn kaj parolis iom en esperanto ; aliaj gravuloj de la urbo kaj provinco partoprenis la simpozion aktive.

Partoprenis pli ol 100 personoj el diversaj landoj. Partoprenis unu belgo, unu brito, kelkaj el orienta Europo kaj dum iu debato venis la demando : « *Kiu havas latin-devenan denaskan lingvon ?* » kaj mi estis la sola. Mirinda nova situacio por mi.

Okazis elektoj ene de la estraro de ILEI. La Komitato decidis havi naŭ-personan estraron. Elektoj okazis sub efika gvidado de la elektokomisiono. La nuna prezidanto S-ro Stefan MacGill el Novzelando-Hungario plu prezidos la Ligon. Same restas S-ino Korody el Hungario-Germanio kaj S-ro Radojica Petroviĉ el Serbio. Plie elektiĝis 6 novaj personoj. La Komitato akceptis 3 novajn sekciojn : tiujn de Mongolio, Vjetnamio kaj Nepalo.

Mi proponis, ke ILEI havu komisionon por helpi al la kandidatiĝantaj sekcioj por verki statuton kaj organizi sin mem antaŭ la sinprezento al la elekto laŭ la modelo de UEA ; mi anoncis pretecon kunlabori en tia laborgrupo. La Komitato decidis, ke ne devas esti komisiono, sed komisiito, kaj nomumis min en tiun oficon.

La prezidanto de la Loka Konferenca Komisiono S-ino Gong « Arko » faris elstaran organizan laboron. Ŝi estis elektita nova estrarano de ILEI.

Dum la lingva festivalo mi povis prezenti komparon inter du planlingvoj : Esperanto kaj Rumantsch Grischun. Dum la simpozio mi prezentis la lingvajn, kulturajn kaj sociajn aspektojn de klaso-interŝanĝoj. Mi prenis la ekzemplon de Zuriko kaj Kunming, kiuj estas ĝemelaj urboj kaj montris la multnombrajn eblojn sen fizika renkontiĝo.

Mi tre ĝojis konatiĝi kun kelkaj maljunaj kaj tre kleraj ĉinoj, kiujn oni ne vidas dum la UK-oj kaj kun kiuj mi havis interesajn, fruktodonajn kaj amikajn kontaktojn. Same mi multe babilis kaj amikiĝis kun ĉinaj junuloj.

(Bv vidi en mia blogo mirejo3.blogspot.com la ĉapitron Kunming.)

-oOo-

97a Universala Kongreso de Esperanto

Hanojo, julio 2012

Mireille Grosjean

En la urbo Hanojo pendis 1000 rubandoj kaj banderoloj pri nia UK. Televido kaj ĵurnaloj raportis pri nia kongreso.

La klimato estis varma kaj humida, kiel kutime en tiu orient-azia regiono. Tamen la klimatiziloj zorgis pri agrabla temperaturo en la kongresejo ĉe la hotelo Melia.

Aliĝis 866 personoj. Kunvenis homoj el 62 landoj. En la movada foiro partoprenis 40 asocioj.

Ĉar mia valizo veturis al Hongkongo kaj atingis mian hotelon nur dimanĉe vespere, mi havis neniun dokumenton por la movada foiro, nek pri SES, nek pri Scio Sen Bariloj, mia svis-benina asocio. Tre bedaŭrinda afero.

Tre vigla nacia vespero okazis. Dum la malfermo mi povis saluti nome de Svislando. La Komitato bone laboris sabate posttagmeze kaj vendrede matene kaj okazis pluraj subkomitataj kunsidoj laŭ temoj, tio laŭ tre efika sistemo lanĉita siatempe de S-ro Lee ChongYong, prezidinto de UEA. Mi devis gvidi la kunsidon de la subkomitato pri eksteraj rilatoj, ĉar bedaŭrinde Stefano Keller, la estrarano pri tiu fako, ne povis veni pro malsaniĝo. Mi verkis la raporton kun-labore kun la TEJO-komitatano S-ro Mandirola el Italio.

Estas Elekta Komisiono, kiu preparas la elektojn pri la Estraro de UEA en 2013. Partoprenis nur S-ro Lee Jung Kee el Koreio, membro de tiu Komisiono. Tiu komisiono komencis sian laboron jam en 2011.

Okazis entute 162 programeroj. Internacia Kongresa Universitato ofertis 9 kursojn. La libroservo alportis el Roterdamo 1530 titolojn, entute 700 kg da libroj.

Dum la Tago de la Lernejo okazis diversaj prelegoj ; la temo estis « La arto instrui artojn » ; mi povis prelegi pri instruado de aikido kaj japana pedagogio. La teamo de edukado.net proponis 16 kursojn por lertiĝi pri nia lingvo.

Okazis sesio de KER-ekzamenoj kun 38 kandidatoj ; mi partoprenis por ekzameni en la parola parto.

Okazis multaj fakaj kunsidoj kaj strategia forumo. Kunveno pri esperantologio okazis sub la gvidado de Mélanie Maradan kaj profesoro Kieselmann el Svedio.

La kutima aŭkcio raportis pli ol 1300 eŭrojn por la volontula kaso de UEA.

Okazis la kutimaj belartaj konkursoj kaj oratoraj konkursoj. La Fondaĵo Grabowski donis sian unuan premion al S-ro Gerrit Berveling el Nederlando. La dua premio iris al ARKONES, ĉiujara arta kunveno en Poznan, kie mi prelegos en septembro. La premio Deguchi iris al Gesinjoroj Grattapaglia el Brazilo.

UEA havas du novajn honorajn membrojn.

Mi reĝisoris kaj prezentis kun junulino « Hirundino » el Vjetnamio la Internacian Artan Vesperon.

La Ŝtato Vjetnamio transdonis al UEA la medalon de amikeco. Arbo estis plantita en parko de amikeco, kie apud la arbo staras memorŝildo pri nia kongreso. La urbestra akcepto estis grandioza bankedo.

Partoprenantoj el Svislando estis Barbara Pochanke el Wil, Mélanie Maradan el Ĝenevo kaj Gesinjoroj Rooke el Oensingen (laŭ mia scio). Ni havis plurajn agrablajn renkontiĝojn inter ni.

Mi havis grandan plezuron revidi plurajn geamikojn el la tuta mondo, speciale Jérémie Sabiyumva, prezidanto de la Burunda Esperanto-Asocio. Mi povis

konatiĝi kun du afrikanoj el Kongo RDC kaj kun unu el Niĝerio. Ni povis dum Internacia Arta Vespero kune kanti la faman afrikan kanton « Malaika » en la swahila lingvo.

-oOo-

Svisa Koruso

Somera kanta semajno en Burgonjo

Elisabeth de Mestral

Dum la unua semajno de julio la svisa koruso pasigis muzikajn tagojn apud Châlon s/Saône en St-Vallerin en bela kaj antikva domo nomita *Le Pinnacle*.

Tiu domo estis foje monaĥejo, poste nobeldomo kaj vinber-bieno. Nun alemana paro gastigas plej ofte artajn grupojn. Korusoj, muzikaroj, muzikstaĝoj, pentristaj staĝoj kaj kuirateljeroj okazas en tiu bela loko.

Eblas ankaŭ ferii kiel simpla gasto: www.le-pinnacle.com

Arbara kaj flora ĝardeno kun kuŝseĝoj invitas la gastojn kviete pigrumi...

Matene la koruso kuniĝis en agrabla granda salono, kie ĝi trejniĝis. Bela koncerta piano estis je dispono.

Nia nuna repertuaro konsistas el kantoj de la Renesanco, popolaj svisaj, kaj nordaj kantoj. Tamen muziko postulas multe da ekzercoj por progresi. Kanti kvar-voĉe signifas bone koni sian voĉon sed ankaŭ aŭskulti la aliajn, ĝuste spiri, sekvi atente la direktadon, kompreni kaj esprimi sian tekston, nuanci la diversajn frazojn laŭ la etoso de la kanto.... Foje oni devas rekanti dekfoje la saman frazon, malkuraĝiĝas, grumblas, humuras kaj finfine ridas ; entute... bela programo por stimuli niajn kapon kaj korpon.

Historieto : Ĉar salviaj, eŭkaliptaj, mielaj bonbonoj cirkulas inter kantantoj, iu (mi ne diros kiu) sidis sur ilin kaj pro la varmo, li restis preskaŭ gluita al la seĝo ne sciante kial... Ne plu eblis kanti serioze post tio !

Ĝenerale la posttagmezoj estis dediĉitaj al aerumado en la regiono. Okazis bicikla ekskurso laŭ malnova fervojo, kiu estis transformita en bicikla vojo sufiĉe ebena. Ĝi nomiĝas « la verda vojo », do tute taŭga por esperantistoj, kiuj sentis flugilojn sub la piedoj, ĉefe tiuj, kiuj luis elektran biciklon !

Alian tagon la koruso piedmigris sur ĉarmaj kamparaj vojetoj, admirante vilaĝetojn, flarante florojn kaj aŭskultante la sonorilojn de la trankvilaj blankaj bovinoj franclingve nomataj « *charolaises* ». Babiladoj, humuraĵoj viglis dum la pikniko, ĉefe kiam glasoj da bona vino tintis !

Vespere la dommastrino atente zorgis pri siaj gastoj. Bonaj hejmfaritaj pladoj refortigis nian grupon post kantadoj kaj ekskursoj. Ni ankaŭ festis la naskiĝ-

datojn de Nancy Fontannaz, Dieter Rooke kaj Bernard Nicolet... Bona kialo por mendi kukon aŭ glasojn da ŝaŭmvino !... Pli malfrue en la muziksalono pretiĝis dormo per la kanto « Dormu vi » aŭ « Himno nokta ».

Iun fojon je la noktofalo Bernard Nicolet ludis alpokornon en la korto, la domestro eltiris akordionon, la koruso dancis, kantis sub la amuzataj okuloj kaj aplaŭdoj de kelkaj preterpasantoj kaj fenestr-aŭskultantoj.

La lastan tagon esperantistino de Châlon venis por renkontiĝi kaj ŝi tagmanĝis kun ni.

Resume, ni trapasis bonetosan semajnon. Tiuj travivaĵoj fortigas ligojn inter homoj. Oni lernas, kiel elturniĝi kaj komunikiĝi malgraŭ diversaj malsimilaj temperamentoj. De 2008, eko de la koruso, amikecoj disvolviĝas. Krom muziko niaj renkontiĝoj permesas ekzerci esperanton, despli devige, ke June, la ĉarma edzino de Dieter (aleman-parolanta), venas de Ĉinio. Tial krokodilaĵoj ne eblas, kiam ni deziras kompreniĝi !

(Vidu la fotojn sur la malantaŭa kovrilpaĝo)


-o0o-

Morto

Carlo Nicolodi

29 majo 1940 – 7 februaro 2011

Carlo Nicolodi



(Laŭ foto en *Trentini nel Mondo* 2012-1)

Carlo Nicolodi, denaska esperantisto, naskiĝis la 29an de majo 1940 en la vilaĝo Sover en la valo di Cembra en Trentino (Italio).

Liaj gepatroj fakte renkontiĝis kaj ekamikiĝis okaze de esperantorenkonto. Dum la patro originis el Trentino mem, la patrino havis latvan judan devenon. Oni povas imagi la familian situacion de tiu esperantlingva paro en la faŝisma Italio !

En tiu freneza tempo, konservante sian fidelecon al sia familia esperantismo, Carlo jam kiel junulo trovis sian luktan forton per aliĝo al la komunista partio en Italio mem. Kaj dum sia tuta vivo li fidelis al ambaŭ idealoj esperanta kaj komunisma, unue en Wiesbaden en Germanio,

kien li unue migris, trovinte laboron en kliniko. Poste kun siaj dan-devena edzino Annalise kaj juna filino Sandra, okaze de nova migrado, li instaliĝis en Svislando. En Bazelo li plue oficis en sia fako ortopedia.

Sian viv-aventuron li aŭtobiografie rakontis itallingve en teksto titolita *La stagione dei ricordi*, kiu estis legita post lia morto okazinta la 7an de februaro 2011 post longa kormalsano.

La prezento de tiu rakonto okazis la 17an de septembro 2011 en la Waisenhaus en Bazelo dum digna adiaŭa ceremonio.

Esperantuje sian komunismon Carlo Nicolodi konkretigis interalie per aktiva aparteno al la Internacia Kolektivo de Esperantistaj Komunistoj (IKEK). Kaj en la politika vivo de Bazelo li deĵoris kiel sekretario de la bazela organizaĵo pri rajtoj de laboristoj kaj enmigrintoj.

Krome li aktivis en diversaj bazelaj maldekstraj kaj pacismaj medioj.

Itallingve li agis en Bazelo mem ĉe la *Circolo di Basilea* kaj en Italio kiel membro de la *Direttivo del Circolo stesso*.

Koncerne al la esperanto-vivo en Svislando ni fine menciui, ke kun siaj edzino kaj filino li partoprenis en 2002 ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds konferencon de IKEK. Tie Dieter Rooke lin unuafoje renkontis. Kaj kiel Dieter mem asertas, ekde tiam

inter ambaŭ esperantistoj kreskis vigla amikeco.

Por Dieter, Carlo fariĝis inspiranto al pli vigla laboro por IKEK. Tial ekde tiam Dieter Rooke dum la Universalaj Kongresoj regule mendas salonon por kunvenigi la komunistojn.

Claude Gacond

(Fontoj :

« *In memoria di Carlo Nicolodi, ad un anno dalla scomparsa* », aperinta en *Trentini del mondo*. 2012 n-ro 1.

« Mortis nia kamarado Carlo Nicolodi », en *Internaciisto* 2011 n-ro 104 p.16.

Kaj reta mesaĝo de Dieter Rooke mrm de la 18 de septembro 2011.

Kulturaj paĝoj

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Edmond Privat mortis antaŭ 50 jaroj

Richard Schneller konversacias kun Claude Gacond

Richard Schneller : La festado de la 125a naskiĝjaro de Esperanto ne forgesigu nin, ke antaŭ ekzakte duonjarcento mortis Edmond Privat, tre verŝajne la plej grava svisa esperantisto.

Claude Gacond : Vi pravas. La aŭtoro de *Vivo de Zamenhof* mortis en Rolle sekve al akcidento la 28an de aŭgusto 1962. Komence de la sama monato mi estis vizitinta lin en lia ĉaledo en Gland por precizigi kun li diversajn lingvajn demandojn rilate al liaj aŭtobiografiaj radio-elsendoj, kiujn mi tajpe pretigis kun Henri Vatré por la eldonisto Juan Régulo Pérez. Tiam Privat mem proponis la titolon *Aventuroj de pioniro* por siaj 55 prelegoj improvize disaŭdigitaj inter oktobro 1952 kaj junio 1954. Necesis koherigi manuskripton, kiun li rapide skribis plej ofte dum trajna veturo al Berno. Dum tiu kunveno Edmond Privat liveris al mi alian radio-elsendaron pri la *Vivo de Gandhi*, por ke mi same pretigu ĝin por apero en la

kolekto *Stafeto*. Tiu libro fakte publikiĝis en 1967.

R. S. : Kaj ne nur pri la manuskriptoj de Edmond Privat vi plue okupiĝis post lia morto, sed vi ankaŭ transprenis lian prelegan funkcion ĉe Svisa Radio Internacia, ĉu ne ?

C. G. : Komence de la jaro 1962, Edmond Privat, dum kunsido de la Estraro de la Esperanto-Edukistaro de Svislando, elektis la latiniston Charles Ecabert, tiam prezidanto de EES, kiel posteulon por la radio-prelegoj. Sed Ecabert akceptis transpreni tiun deĵoron nur kondiĉe, ke mi, kiel sekretario, pretu lin anstataŭi okaze de bezono. Post la akcidenta morto de Edmond Privat, Charles Ecabert tuj ekplenumis sian prelegan funkcion jam finaŭguste. Sed oktobre li mem akcidentiĝis kaj je la 15a de decembro subite mortis. Vi povas imagi en kiu drama situacio mi veturis al Berno por ekprelegi ĉe la radio !

R. S. : Vere funebra estis por vi la jaro 1962.

C. G. : Des pli ke samjare mia amiko Jules Gilliard ankaŭ akcidente mortis en la printempo kaj ke lia valora esperanto-biblioteko, kiun mi regule konsultis, estis stulte forĵetita de liaj familianoj.

R. S. : Tiu katastrofo certe ekinstigis vin al savo de arkivaĵoj.

C. G. : Kaj ne nur pri esperanto mem, sed ankaŭ pri la aliaj konkurcaj planlingvoj. Tiu materialo interlingvistika, kiun mi savis, kontribuis al la kreo de CDELI kadre de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, kie mi zorgadis pri la katalogado de la libraro de la loka esperanto-grupo kun la bibliotekistino Suzanne Boichat.

R. S. : Kaj via unua urĝa tasko certe estis la rikolto de la dokumentaro de Edmond Privat.

C. G. : Jes, sed mi sentis la neceson apartigi ĝin de la antaŭviditaj savotaĵoj. Tial mi celis konsistigon de aparta arkivaro, kiun Yvonne Privat heredigis al la Biblioteko, kiel tutaĵon por la kreo de la dokumentaro *Fonds Edmond Privat*.

R. S. : Multon rakontindan vi certe havas tiurilate. Sed koncerne al Edmond Privat mem, kiel vi konatiĝis kun li ?

C. G. : Vi deziras scii, kiel mi konatiĝis kun Edmond Privat. Fakte la respondo simplegas : per liaj artikoloj. Jes ja, estas per liaj artikoloj, kiujn mi tralegis pli kaj pli regule semajnon post semajno, ke mi renkontiĝis kun lia personeco, kiu

tutcerte vigle influis mian mondkoncepton. Liaj artikoloj aperadis en la romandaj gazetoj *Coopération*, *L'Essor* kaj *La Sentinelle*.

En mia familio ne vizitadis nin *La Sentinelle*, kiu estis tagalo¹ legata en social-demokrataj familioj. Sed la semajnalon *Coopération* kaj la monatalon *L'Essor* abonis miaj gepatroj. Tial ekde kiam la plenkreskula lingvaĵo ĉesis esti por mi nekomprenebla fremdaĵo kaj ekde kiam la deĉifro de longeta teksto gazeta por mi ĉesis esti malkuraĝiga heroaĵo, tiam mi ekŝatis trafoliumi tiujn du periodaĵojn *Coopération* kaj *L'Essor*, kiujn mi sentis ŝatataj de miaj gepatroj. Mi ĉefe serĉadis en ili la artikolojn subskribitajn *Ed. P.*, kiujn mi kapablis pli malpli kompreni, kvankam iliaj temoj ofte ne koncernis la priokupojn de dekdujara infano. Tamen ili certe informadis min pri tutmondaj eventoj kaj ankaŭ pri la kuraĝa luktado de neperformuloj, kiuj rezistis al politikaj evoluoj ŝajne kaj dirite neinflueblaj.

R. S. : Do kiel infano vi konatiĝis kun Edmond Privat ?

C. G. : Sed dum jaroj mi ne havis la okazon lin persone renkonti. Tamen mi konatiĝis pli kaj pli precize kun lia penso. Per liaj artikoloj mi ekkomprenis, ke la potenco de koloniaj registaroj kaj de kapitalismaj regantoj povas esti perturbita far la regatoj mem, kiam tiuj ĉi

¹ Tagalo: tag-ĵurnalo ; semajnalalo : semajnjurnalo ; monatalalo : monat-ĵurnalo (ĉiuj tri Piĉismoj).

kapablas kuraĝe rezisti al maljustaĵoj. Mi eklegis kun entuziasmo pri la influo de Mahatma Gandhi en la hindaj kolonioj sendependiĝemaj fronte al la brita regado, kaj pri la kuraĝo de la svisa pacisto Pierre Ceresole, kiu eĉ en milita tempo rezistadis al la armeaj ordonoj cele al la kreo de civila helpservo kaj pro tio ree kaj ree estis enkarcerigita kiel krimulo.



Edmond Privat en la 1950aj jaroj.
(Foto : Vikipedio)

R. S. : Edmond Privat verkis biografion de Gandhi. Ĉu ĝin vi ankaŭ legis, aŭ nur per artikoloj vi intimiĝis pri la vivo de Gandhi ?

C. G. : Iom post iom mi akiris la librojn de Privat. La raporto *Aux Indes avec Gandhi* kaj la biografio *Vie de Gandhi* tutcerte estis la unuaj, kiujn mi aĉetis per mia poŝmono, ĉar ili estis tre aktualaj. Dum la tagalo de Neuchâtel *La Feuille d'Avis* rakontaĉis pri fakiro, kiam ĝi raportis

pri Gandhi, tiam Privat malkovrigis al ni pli realan situacion. Pro liaj artikoloj kaj libroj la svisa gazetaro estis devigata pli objektive raporti pri la neperfortaj luktoj en la hindaj kolonioj de Britio.

Mian kontraŭmilitismon, iel hereditan de familia tradicio, tutcerte fortikigis en mi tiuj raportoj de Edmond Privat pri la militrifuzantoj, kiuj estas traktataj kiel krimuloj, simple ĉar ili deziras servi la patrujon per civilservo, prefere ol kadre de la arma sistemo.

R. S. : Tiurilate vi menciis la nomon de la pacisto Pierre Ceresole. Kion li faris, por ke Privat lin menciu en siaj artikoloj ?

C. G. : Pierre Ceresole... Koncerne al la legado de la artikoloj de Privat, mi menciu, ke tre regula leganto de la socialista gazeto *La Sentinelle* mi fariĝis, kiam dekkvarjara mi eniris la duagradan instru-nivelon. Ĉar la urba biblioteko situis en la supra etaĝo de la lerneja domo *Collège latin*, kiun mi frekventis, mi ekkutimis vizitadi almenaŭ unufoje semajne ĝian legejon, ne nur por konsulti intereseĝajn vortaregojn, kiel faris aliaj kamaradoj, sed ankaŭ por legadi la artikolojn de Edmond Privat pri la internacia vivo en *La Sentinelle*. Kaj tiurilate mi tre bone rememoras pri tiama rimarko de la gardisto de la legejo. Tiu bibliotekisto verŝajne konis mian familion kaj ne estis socialisto. Foje li venis al mi, ĝuste kiam mi trafolumis la lastajn numerojn de *La Sentinelle* serĉe al la ĉiutaga rubriko de Edmond Privat. Kaj li sagis al mi tiun

ĉi rimarkon : «*Viaj gepatroj certe ne estus fieraj pri vi, se ili vidus vin legi tiun gazetaĉon !* » Mi ne estis timema knabo, kaj mi tuj rebatis : «*Mi scias, ke vi ne havas la rajton kontroli miajn legaĵojn !* »

R. S. : Tiu via rimarko kolerigis lin, ĉu ?

C. G. : Verŝajne jes, sed li ne respondis al mi. Sed mi ne restis pasiva. Intelekte mi havis multajn kontaktojn kun fratino de mia patrino, kiu estis instruistino. Fakte en ŝia klaso mi eklernis legi kaj ekde tiam tiu onklino Blanche Lüscher favoris mian legemon per pruntedono de libroj, kiuj ĉiam entuziasmigis min. Ankaŭ ŝi estis legemulino, kiu frekventadis la bibliotekon kiel ano de la societo de la aktualaĵoj (*Société du livre contemporain*), kiu finance helpadis al la biblioteko por la akiro de la plej freŝaj verkoj de la modernaj verkistoj, kiel André Gide, Jean-Paul Sartre, Simone de Beauvoir. Tiujn librojn la liceanoj ne rajtis elprunti, sed mia onklino per subskribita peto ofte peradis min por ilia pruntado. Ankaŭ tiam la sama bibliotekisto ŝatis rimarkigi al mi, ke nur ĉar la pruntopeto venas de societano, li servas min, kaj ke tiuj libroj ne estas por knaboj, kies oreloj ankoraŭ malsekas !

Mi raportis al mia onklino Blanche pri la rimarko de la bibliotekisto en la legejo koncerne al la konsultado de la gazeto *La Sentinelle*, kaj ŝi ege koleris, ne kontraŭ mi, sed kontraŭ tiu bibliotekisto. Kaj la sekvan tagon ŝi akompanis min al la biblioteko, kaj mi konstatis, ke ŝi estis

kuraĝulino. Ŝi komprenigis al la bibliotekisto, ke kiel ŝi mem ne havas la rajton malhelpi siajn lernantojn akiri propran penson, eĉ se tiu ĉi persona orientiĝo fremdas al ilia familio, li ankaŭ ne havas la rajton iel ajn cenzuri la legemon de la liceanoj en la legejo. Kaj ŝi konkludis avertante lin, ke se ŝi aŭdos pri iu ajn ripeto de lia nedemokrata kaj kontraŭkultura sinteno, ŝi tuj iros rekte plendi ĉe la direktoro de la publika instruado. La bibliotekisto certe sciis, ke mia onklino ne estis sen-signifa instruistino. Ŝi fakte gvidis modelan klason en la porinstruista lernejo. Ekde ŝia interveno mi povis trankvile legi la artikolojn kaj la librojn de Edmond Privat kaj ankaŭ de Pierre Ceresole, la apostolo de la Servo Civila Internacia, sen plua interveno de tiu kontraŭsocialista bibliotekisto.

Koncerne al la vigla interveno de mia onklino Blanche, mi menciis, ke tutcerte ĝi multe influis min. Ekde tiam, sekve al ŝia ekzemplo, mi neniam hezitis kontraŭstari al regemaj superuloj, eĉ se ili estis miaj profesoroj, kaj fakte tio akirigis al mi aŭtoritaton en miaj rilatoj unue kun la instruistaro, kaj poste kun la publikaj instancoj. Sed mi eble iom longe rakontis tiun ĉi eventon. Tion ĉi mi faris, ne nur pro la decidiga influo, kiun ĝi havis sur mian personecon en formiĝo, sed ankaŭ ĉar estas dank' al tiu ĉi onklino Blanche, ke mi havis poste mian unuan realan kontakton kun Edmond Privat. Sed pri tio ĉi mi raportos pli poste.

R. S. : Ĉu en multaj aliaj familioj oni ŝatis la artikolojn de Privat ?

C. G. : Tutcerte jes ! Privat, ĉefe per la gazeto *Coopération*, havis grandan influon en Romandio. Post la morto de Edmond Privat, en omaĝa artikolo Alice Rivaz ĝuste raportis pri la prestiĝo, kiun la amiko de Mahatma Gandhi kaj de Pierre Ceresole akiris en ŝia familio. Ŝia raporto centprocente respegulas etoson, kiu ankaŭ regis en mia propra familio. Tial mi citos al vi kelkajn fragmentojn el tiu teksto laŭ iom rapida esperantigo.

R. S. : Sed unue, ĉu vi povus diri, kiu estis Alice Rivaz ?

C. G. : Alice Rivaz estis ŝatata verkistino, kies romanojn kaj eseojn legadis vasta populara publiko en Romandio. Ŝiaj diroj pri Edmond Privat respegulas la etoson, kiu regis ne nur en mia familio, sed tutcerte en multaj aliaj, en kiuj oni tre atente legadis la artikolojn de Privat en *Coopération*. Mi citas ŝin :

« Mia patrino malkaŝe deklaris por li veran respekton, ĉar tra la ideoj de Edmond Privat, la socialismo aperis al ŝi fekundigita de evangelia spirito liberigita de ĉia suspekto je fanatismo aŭ perfortemo. Mia patro siaflanke admiris la vastan kulturon de la historiisto, lian intelektan honestecon, lian senpartiecon, lian profundan saĝon kaj lian stilon memkompreneblan, simplan, kiu kapablis vidigi kaj sentigi tute konkrete la internaciajn problemojn la plej malfacilajn kaj tiel igi ilin kompreneblaj al ĉiuj. Stilo sen pretendemo, sed kun delikata humuro iel briteca, kapabla sugesti multajn faktojn per kelkaj vortoj, kaj ĉiam

konvene enkondukita en liaj raportoj kaj precize en liaj artikoloj pri eksterlanda politiko, kiujn li publikigis dum sia tuta vivo en la maldekstra gazetaro, sentiĝis kvazaŭ lumigo. Tiuj artikoloj de Edmond Privat, mi povas diri, ke mi ilin legadis tute regule kaj kun la plej granda atento dum trideko da jaroj. Mi atendadis ilin ĉiam kun senpacienco, ĉar ili alportis al mi, tion, kion mi ne povis trovi en aliaj periodaĵoj : ian konstaton kaj vizion super la internaciaj eventoj de la momento, kiuj ne lasis lokon al iu ajn misinformado aŭ partizana interpretado, kaj tio, ĉar ili donis al ni la eblon reveni al la fonto de la konfliktoj kaj malkovri ties donitaĵojn kaj rezultojn. Tiujn faktojn ili klarigis, sen falsigo, helpante la leganton pli facile malplekti iliajn kunigitajn fadenojn, kaj plie ekkapti la elementon neglektitan aŭ vole silentigitan far la resto de la gazetaro, elementoj kiuj, sen tiaj artikoloj, estus restintaj al ni mem kaŝitaj, dum metitaj sub niaj okuloj, en sian ekzaktan lokon, ili montriĝis la pruvobjekto en la dosiero, ebligante al ni ekkompreni la mekanismon de la eventoj, ne nur en ties historia kunteksto kaj malmola socia kaj homa realaĵo, sed ankaŭ laŭ perspektivoj, kiuj ilin superis kaj nin reorientis al la espero, kiun Edmond Privat konservadis fronte al ventoj kaj tajdoj en la estonto de la homaj societoj, kie justeco fine elmergos el la miljaraj kaosoj. »

Ankaŭ la konkludo de Alice Rivaz estas la mia : « Hodiaŭ liaj artikoloj mankas al mi. Nenio anstataŭis, kion ili alportadis tiel longe semajnon

post semajno, pri kio mi restas al li profunde dankema. »

R. S. : Dankon pro la esperantigo de tiu omaĝo al Edmond Privat de Alice Rivaz.

C. G. : Por reveni al mia familio, koncerne al la influo de Privat, mi ŝatus aldoni, ke profundan admiron ni havis por la aŭtoro de tiuj artikoloj, pro lia kuraĝo kaj honesteco. Kaj okaze de reala renkonto kun Edmond Privat, ĉiam respektemon ni sentis.

Pri la influo de Privat en mian familion mi aldonos, ke per la gazeto *L'Essor*, kiu sub la redaktado de Privat, de organo de liberala protestantismo, fariĝis pli kaj pli la organo de « la amikoj de la amikoj », la unuaj amikoj estantaj la kvakeroj, kaj la aliaj la amikoj de la kvakeroj, tio estas la vasta publiko en Romanio, kiu ŝatis la vidpunkton kaj kuraĝon de la kvakeroj : tiu provo helpi eĉ al la malamikoj.

En mia familio de tendenco evangelia la influo de Privat instigis tutcerte miajn gepatrojn helpadi al la infanoj, sen konsidero al ilia deveno. La Ruĝa Kruco ĉiam informiĝis, ĉu ni pretos mone helpi, eĉ se la ricevantoj de tiuj helpoj estas judaj aŭ germanaj infanoj, kion miaj gepatroj aprobis, ĉar la svisoj, kiuj estis donacemaj ĝenerale por la etaj francoj, ĉesigis siajn donacojn, kiam

ili eksciis, ke ili atingas judajn aŭ germanajn infanojn.

Tiuj artikoloj puŝis min persone al pacisma orientiĝo. Kiam en la hejmo mi fariĝis junulo eksentanta ribelemon al la familiaj okupoj, tiam mi povis solvi mian problemon tiel, ke kiam la feriado kun la familio ne plu interesis min, mi iris pioĉi, ŝoveli kadre de la restadejoj de la Servo Civila Internacia en la valeza montaro. Kaj kial ? Ĉar mi estis leginta ofte ĉe Privat pri tio. Kaj tiel mi havis multajn kontaktojn kun valoregaj homoj respektemaj al la ĵus mortinta Pierre Ceresole, ĝuste en la aĝo, kiam oni bezonas identiĝi al eksterfamiliaj modeloj. Kun grandega respekto mi memoras pri la SCI-sekretario Ralph Hegnauer, kies arkivo nun kuŝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds apud tiu de CDELI.

Kaj la unuajn esperantistojn mi renkontis en tiu movado, inter kiuj Jules Gilliard, kiu fariĝis mia unua esperanto-instruisto, kiam mi estis en la porinstruista lernejo. En tiu medio mi akiris mian veran spiritan ekvilibron kaj la estontan kuraĝon por kapabli diri ne al armea rekrutiĝo kaj jes al kreota civila servo.

En nia venonta konversacio mi rakontos, kiel mi renkontiĝis kun Edmond Privat dank' al mia onklino Blanche Lüscher.

-o0o-

Esperanto en GDR : Dokumenta kroniko pri malhelpita junularo

Andreas Künzli

(Recenzo de germanlingva libro.)

Esperanto malpermesita en GDR inter 1949 kaj 1965

Kiel oni scias, esperantistoj estis en diversaj diktaturoj kaj totalismaj ŝtatoj persekutitaj, kondamnitaj, mal-liberigitaj aŭ mortigitaj, iliaj agadoj kaj lingvo diversgrade malhelpitaj, subpremitaj aŭ malpermesitaj, ĉefe pro tio, ke ili estis konsideritaj (kaj akuzitaj) kiel popolamikoj, perfiduloj, konspirantoj, spionoj, sabotistoj, teroristoj, trockistoj, kontraŭ-ŝtataj agantoj ktp. (en Sovetunio) aŭ identigitaj kaj nedeziritaj kiel nearjoj (t. e. judoj), marksistoj, komunistoj kaj pacifistoj (en la Tria Regno). Post la dua mondmilito, similan sorton de malpermeso spertis la Esperanto-movado en orienta Germanio (GDR), pro la sekvaj motivoj kaj cirkonstancoj.

La 12an de de januaro 1949 la Esperanto-agado estis malpermesita de la Germana Administracio de la Interno de la Sovetia Okupacia Zono, do sur la teritorio, sur kiu la 7an de oktobro 1949 estis proklamita la t. n. Germana Demokratia Respubliko (GDR), kie regis unue Walter Ulbricht kaj poste Erich

Honecker.² Ĉar en la koncerna leĝa dekreto Esperanto estis menciita en la sama kategorio kiel « popolart-grupoj kaj popolklerigaj asocioj », oni povus supozi, ke temis pri miskompreno kaj ke « popolartaj » grupoj estis konfuzitaj kun grupoj, kiuj okupiĝas pri « artefaritaj » planlingvoj. En junio 1949 la centra partia gazeto *Neues Deutschland* postlive-ris la klarigon, ke ne Esperanto kiel lingvo estas malpermesita, sed Esperanto-grupoj estas malpermesitaj.

Ankoraŭ en 1955 la ĉefa prokuroro de GDR skribis pri Esperanto, ke planlingvoj ne estas naciaj lingvoj kaj havas, konforme al la instruoj de Stalin pri demandoj de marksismo en la lingvoscienco, nenion sciencajn aŭ kulturajn bazojn.³

² Ĉar ne ekzistas libroj pri la historio de GDR en Esperanto (Eo), mi devas referenci al la nacilingva fakliteraturo.

³ Estas evidente, ke la GDR-prokuroro baziĝis je la sovetia vidpunkto. Tamen, laŭ la karaktero, semantiko kaj strukturo de la GDR-dekreto mi vidas ankaŭ sufiĉe perpleksan similecon kun la koncernaj kontraŭ-Eo-dekretoj de la nacisocialistoj (Rust, Kohlbach, Heydrich, Bormann, ktp.) en la 30aj jaroj. Simile do kiel en la kazo de la Tria Regno, ankaŭ el la koncerna GDR-verdikto eblas konkludi, ke la lingvo Esperanto mem (kiu povis esti private flegita) probable ne estis malpermesita, sed ke la Eo-agadoj kaj -grupoj kaj la publika

Malgraŭ tiu malpermeso, post 1949 en la sovetia sektoro de Germanio tamen okazis iuj aranĝoj, en kiuj orientgermanaj esperantistoj partoprenis, kaj en 1960 eĉ aperis la unua GDR-eldono de *Paco*.⁴ Malgraŭ iuj vanaj klopodoj reatingi la plenan permeson, nur en februaro 1965 en GDR la Esperanto-agado estis oficiale allasita kaj povis laŭleĝe ekfunkcii sine de la Kulturligo de GDR. Sed tio eblis nur je la severaj kondiĉoj de la senkompromisa ideologia submetiĝo kaj totala politika lojaleco vidalvide de la gvida komunisma partio SUPG.⁵ Ĉi tiun altan prezon devis do pagi la « oficialiĝinta » Esperanto-movado de GDR, kiu estis adaptita aŭ egalŝaltita kun la oficiala politiko de GDR kaj de la Orienta Bloko.

disvastigo de Eo estis malpermesitaj. Specifa kaj stranga en la GDR-kazo estis la ligo de Eo kun la kategorio de popolartgrupoj. Cetere, kiel N. Stepanov konfirmis, jure valida malpermeso de la lingvo Esperanto aŭ de la Eo-movado ĝenerale en Sovetunio plej verŝajne ne ekzistis, ĉar en la NKVD-aktoj oni ne povis trovi ĝin (sed aliflanke eksplicite malpermesitaj estis unuopaj Eo-agadoj aŭ Eo-produktoj kiel ESKI, *Sennaciulo*, fakte jam en la 20aj jaro).

⁴ La aktivecojn en tiu tikla tempo listigis Fritz Wollenberg en la kajero : Chronik zur Geschichte des Esperanto in Ostberlin 1945-1991. Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR (AGG). Berlin 2002.

⁵ La Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (germane : SED) estis fondita per la deviga unuiĝo de KPD kaj SPD en aprilo 1946 en Orienta Berlino.

Stalinismo kiel tabuo

Post ia enkonduko pri la ekesto de la lingvo kaj movado Esperanto, kiu povis resti nur treege supraĵa kaj, ekzemple en la kazo de Zamenhof eĉ iom karikatureca,⁶ la sociologo Bendias demandas sin finfine ĉu Esperanto estas sekto ? Sen doni respondon li mencias la diversajn provojn de difinoj kio estas aŭ estu Esperanto – ĉu savmovado, opozicia organizaĵo, subkulturo, anti-lingvo, nacia anstataŭaĵo ĝis vizia movado, kiu celas atingi justan solvon de la « internacia lingva problemo » kaj batalas kontraŭ « lingva imperismo ». Ŝajnas ke ankaŭ Bendias apartenas al tiuj, kiuj opinias, ke la angla lingvo kaj Usono « filtras la lingvan medion kaj pretervidas esencajn aspektojn » kaj kulpas kiel « instrumentoj de ekonomiaj superpotencoj por konfliktoj, se ili fariĝas misiemaj ». La kulturon de la Okcidento li konsideras hegemonia kaj « politike arbitreca » (sic). La esperantistojn li laŭdas, ĉar ili metis tiujn demandojn sur sian tagordon jam sufiĉe frue. Mi lasas tiujn (dubindajn) asertojn sen komento, la politika pozicio de Bendias fariĝis klara.

En la ĉapitro pri la historio de la laborista, komunista kaj sovetia Esperanto-movadoj Bendias aludas la ideologiajn diskutojn, kiuj siatempe furoris en la Orienta Bloko, tuŝante la demandon de la konstruado de la komunismaj partioj kaj de la koher-

⁶ En la bibliografio, konsistanta el 624 eroj, eĉ unu Zamenhof-biografio ne estas indikita (aliflanke, estas listigitaj 7 titoloj de verkoj de Stalin !).

eco de la sovetia bloko ; krome, li alparolas la problemon de la kosmopolitismo kaj nature mencias la persekutojn sub Stalin, kiuj devis resti absoluta historiografia tabuo en GDR. En tio, Bendias ĉefe substrekas la historiografian signifon de la libro *La Danĝera Lingvo* (1988) de Ulrich Lins por montri, ke ĉi tiu sendube grava verko, kiu unuafoje kohere priskribis la persekutojn de esperantistoj en Sovetunio kaj aliloke, devigis la « historiistojn » de GDREA almenaŭ ne plu ignori la oficiale prisilentitan temon. Sed skribi pri ĝi oni ĉiukaze povis en GDR nur ekde 1990, kiam estis por tiu fiaskinta ŝtato tro malfrue por rekomenci.⁷

Junularo kiel studinda kategorio

La aŭtoro Torsten Bendias, naskita en 1964 en GDR, studinta juron kaj psikologion kaj nun laboranta

⁷ Kvankam Bendias iom laŭdas la laboron de la t. n. « Laborgrupo por esploro de la historio de GDREA », li evidente pretervidis aŭ ne volis trakti kelkajn siatempe publikigitajn kontribuojn de D. Blanke, kiuj nuntempe ne plu estas oportunaj kaj pri kiuj paroli aŭ skribi estus tro embarase kaj tial estas evitinde. Temas precipe pri lia postparolo al *La Danĝera Lingvo* en la sovetia eldono de la eldonejo Progreso, Moskvo 1990, kaj pri lia recenzo pri tiu libro en *der esperantist*, n-ro 1/1990. Pridubante la sciencecon de la laboro de Lins, en tiuj artikoloj Blanke riproĉis al lia okcidentgermana kolego inter alie, ke li mis prezentis kaj sarkasme interpretis (sic) kelkajn temojn, ke lia prezentado estas mankohava kaj ne sufiĉe objektiva (precipe la partoj pri Sovetunio kaj GDR), ĉar ili ne estas verkitaj laŭ la metodoj de la marksismo, t. e. de la dialektika kaj historia materiismo ktp.

kiel diplomita psikologo-terapiisto, klasifikas en sia germanlingva libro⁸ la Esperanto-junularon de GDR, kies aktivulo kaj atestanto li estis, kiel « niĉon », « junularan reton », « sociigan spacon » kaj « fuĝejon » samtempe. Bendias nomas tiun fenomenon enigma, escepta, ĉar ĝi ekzistis kaj evoluis ekster la monopolo de Libera Germana Junularo⁹ kaj ankaŭ ekster la tegmento de la Eklezio, sed tamen laŭleĝe.

Metodike, Bendias ne intencis prezenti la GDR-civitanojn kiel « viktimojn de la sistemo », sed kiel « agantojn, sendepende de tio, kiom diversa tiu agospaco aspektis konkrete ».¹⁰ Kiel teoriantorientiĝon li elektis la « mikrosociologian » metodon aŭ modelon de Bernhard Schäfers kaj Albert Scherr: Jugendsoziologie. Verlag für Sozialwissenschaften. Wiesbaden 2005. En ĝi rolludas precipe generacia socio-

⁸ La enhavon vdidu sub : <http://d-nb.info/1013146115/04>.

⁹ La t. n. Libera Germana Junularo (FDJ) estis, kontraŭe al la nacisocialisma-faŝisma Hitlera Junularo (HJ), marksisme-leninisme orientita organizaĵo, kiel la komso-molo en Sovetunio, kiu celis eduki siajn membrojn kiel « klaskonsciajn socialistojn ». Kiel sola ŝtate agnoskita junulara organizaĵo ĝi pretendis la monopolon gvidi la junularon entute, kio signifis praktikan malpermeson aŭ subpremon por junularaj grupoj, kiuj estis nekonformismaj, havis alian politikan aŭ ideologian konvinkon aŭ simple volis esti sendependaj de FDJ. Inter la ĉefaj taskoj de FDJ kiel « batalrezervo de SUPG » estis la batalo kontraŭ la « imperiisma sistemo » kaj la amikeco kun Sovetunio. Ekde 1951 en FRG, FDJ estis malpermesita.

¹⁰ Ĉiuj esperantigoj de aK.

logio, sociometrio kaj vivomediaj teorioj.

La koncepto de la libro de Bendias baziĝas sur kronologia-dokumenta strukturo. Ĝuste la kronika parto kun amaso da ĝis nun nekonataj faktoj kaj detaloj estas la plej interesa kaj valora, sed tre utilaj estas ankaŭ la intervjuoj faritaj kun atestantoj; precipe okulfrapas la aŭtentika lingvaĵo de sociolektoj de orientgermanaj junulaj kaj normal-civitanoj, kiu draste kontrastas kun la naŭza politike-ideologie konformisma-sterilizita terminologio de oficialaj GDR-presaĵoj kiel *der esperantist* kaj *Paco*, per kiu la « respondecaj » ideologoj de GDR eks-citis, timigis kaj tedis la legantojn kaj abonantojn dum pli ol tri jardekoj.¹¹ La publikigitaj intervjuoj impese dokumentas la gravajn problemojn kaj obstaklojn, kiujn tiuj gejunuloj alfrontis, se ili volis okupiĝi pri Esperanto. Tio vere ne estis facila afero en GDR, ĉar mankis la bazaj kondiĉoj necesaj por tia aktiveco: Ekzemple la ebleco laŭplaĉe organizi pli grandajn kunvenojn ekster la kontrolo de GDREA, la okazo libere vojaĝi al eksterlando, ĉefe al la Okcidento, kiu restis entute fermita, ĝis la povo transpagi kotizojn kaj aĉeti Esperanto-varojn eldonitajn en aliaj landoj aŭ la disponeblo de propraj allogaj lernmaterialoj kaj Eo-publicaĵoj. Sub la limigaj reguloj de la rigida GDR-reĝimo

¹¹ La ideologian-politikan parton de *der esperantist* mi analizis sub : www.planlingvoj.ch/Esperanto-DDR.pdf (la teksto estos eldonita ankaŭ en presita formo).

la Esperanto-junularo estis kvazaŭ kondamnita ekzisti en iu « griza zono » inter suspektata duonoficialeco kaj tolerata nekonformisma privateco. Ke Esperanto-gejunuloj ĝuste ne agu libere, laŭplaĉe kaj nekontrolite ekster la permesita kadro, pri tio zorgis la estraro de ZAKE/GDREA¹² sub la (...) gvido de la sekretario D. Blanke, kiu, konfesinde, krom administri kaj gvidi sendube ankaŭ klopodis fari por Esperanto kaj interlingvistiko kion li povis fari.

Kiel Linde Knöschke, unu el la fruaj Esperanto-virinoj en GDR, klarigis en unu el la intervjuoj, junularaj grupiĝoj estis io spontana kaj provizora, kiuj pro la aĝlimo kaj geedziĝoj kutime ne ekzistis tre longe. Ĉi tiu problemo ja estis konata ankaŭ en aliaj landoj.

La rolo de la Stasio por la Esperanto-movado

Multaj legantoj verŝajne transsaltas la paĝojn por rekte alveni ĉe la plej interesa ĉapitro pri la rolo de la ŝtata sekureco (paĝoj 262-273).¹³ En tiu ĉapitro la aŭtoro *piednote* informas, ke « por tiu ĉi laboro esencaj fariĝis 35 MfS¹⁴-aktoj kun entute 1631 paĝoj ». La aŭtoro taksas la

¹² Unue ekzistis Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR (ZAKE) kaj poste, en 1981, estis fondita Esperanto-Asocio en la Kulturligo de GDR (GDREA).

¹³ Cetere, ĉi tiu libroparto ne aperas en la versio de Guglaj Libro, en kiu la libro estas prezentita.

¹⁴ Mallongigo por Ministerio por Ŝtata Sekureco (de GDR), simple : La Stasio.

iaman Stasion de GDR « laŭ dungita personalo unu el la plej fortaj sekretoj servoj de la mondo ».¹⁵ Prezentante kelkajn rezultojn de la ekspluatado de tiu materialo, la aŭtoro rivelis, ke la Stasio interesiĝis pri Esperanto ĉefe antaŭ 1965. Poste, kiam Esperanto fariĝis laŭleĝa okupo, ĝi ŝajne perdis grandparte sian intereson pri tiu objekto, kaj la observado limiĝis al unuopaj personoj « sur pli malalta nivelo ĝis la turniĝo » (do en 1989). La malpliigon de la observado Bendias klarigas per la supozo, ke en la Stasio la informiteco pri la Esperanto-movado en iu momento atingis sufiĉan gradon. Li konstatis, ke la Stasio ne aplikis « unuecan strategion » rilate al Esperanto kaj ke speciala Esperanto-sekcio ĉe la Stasio ne ekzistis por observi Esperanton, kio malfaciligas hodiaŭ la esploradon. En la ĉapitro oni trovas ankaŭ skizon pri la klasika « kariero de IM », kiu estis la sekrete dungita informagento de la Stasio kun la tasko prispionadi aliajn

¹⁵ Vd. ankaŭ Gieseke, J. : Die Stasi 1945-1990. München 2011 (ĉi tiu grava titolo mankas en la bibliografio). La Stasio-dokumentojn administras la Federacia Delegito por la Aktoj de la Ŝtata Sekureca Servo de la iama GDR. Ĝis la fino de 2009 ĉ. 1,7 milionoj da privataj personoj pet-skribis por konsulti siajn Stasio-aktojn. La intereso de la civitanoj pri la dokumentoj de la Stasio daŭre estas grandega : En 2009 kaj 2010 pli ol 190 000 personoj volis vidi siajn Stasio-aktojn, t. e. unu triono de ili por la unua fojo. Ankaŭ esploristoj el tuta Germanio kaj eksterlando rajtas peti la konsultadon de certaj Stasio-aktoj por sciencaj celoj.

civitanojn kaj raportoj al la Stasio.¹⁶ Krom en la kazo de iu « Gerd Gerhardt », kiu ludis sian iom enigman ludon, sed poste fuĝis al la Okcidento, deklarante sin viktimo, neniu nomoj de suspektataj Stasio-agentoj estas menciitaj. Bendias konfirmas, ke neniu el la malnovaj laboristaj esperantistoj el la Vejmara tempo funkciis kiel IM, dum ĉe la « juna generacio » troviĝis « la plej multaj IM-oj ». Laŭ la trovitaj Stasio-dokumentoj aktivadis ĉirkaŭ 15 IM-oj en la Esperanto-movado de GDR. Koncerne la prioritatojn de la Stasio rilate al la Eo-movado, Bendias konfirmas ankaŭ, ke la Stasio interesiĝis ĉefe pri tio, ĉu en la Esperanto-movado formiĝas grupoj, en kiuj oni « kritike parolas aŭ pensas pri la ŝtato ». Oni volis ankaŭ ekscii, ĉu ekzistas certaj personoj en tiuj grupoj, kiuj nur ŝajnigas sian politikan lojalecon aŭ ĉu ĝi estas sincera. Same oni interesiĝis pri la demandoj, ĉu la Esperanto-movado de GDR estas iel subfosata de homoj el la Okcidento, precipe el FRG, ĉu ekzistas kontaktoj kun eksterlandanoj, ĉu okazas privataj tranoktoj k. s. Specialan atenton oni atribuis al ĉiuj presaĵoj (de kiuj multaj estis konfiskitaj¹⁷). Kaj nelaste la Stasio volis ekscii, ĉu prepariĝas agadoj

¹⁶ Oni taksas la ekziston de ĉ. 200 000 Stasio-informagentoj, laŭ aliaj ciferoj ekzistis ĝis duonmiliono de ili. Kompare, GDR havis 16,675 milionojn da loĝantoj.

¹⁷ Kiel tiama redaktoro mi memoras, ke la bulteno *Tejo-tutmonde*, kiun ni sendis al diversaj junuloj en GDR, estis konfiskita de la GDR-organoj kaj resendita (kun aŭ sen oficiala stampo de la GDR-poŝto) aŭ ne atingis la ricevantojn.

lige kun la intenco forfuĝi el la respubliko. Do, ankaŭ en la kazo de GDR oni povas konkludi, ke la sekretajn servojn interesis unuavice la politika sinteno kaj lojaleco de la propraj civitanoj, dum ilia esperantisteco estis ŝajne duaranga.

Kion la sekurecaj servoj ankoraŭ faris

Dum la Stasio produktis informaron pri ĉirkaŭ 120 GDR-esperantistoj, en la 1960aj jaroj ĝi prispionigis ankaŭ ĉeĥoslovakiajn esperantistojn, kio atingis sian kulminon okaze de la Praga Printempo en 1968. Ne estas klare, ĉu en la menciitaj kazoj (Dubĉek-klubo, Grupo KAN en Ostrava kaj Klubo 231), kiuj trovis la apartan atenton de la sekretaj servoj, troviĝis ankaŭ esperantistoj. Bendias pluraportas, ke post la fino de la proklamo de la milita stato en Pollando en 1983 la sekreta servo interesiĝis pri tio, ĉu iuj Esperanto-grupoj disvastigas « herezan skriban materialon ». Krom tio en 1978, kiam okazis la UK en Varsovio, la Stasio liveris, tra la « Operacia Grupo de Varsovio », « mallongan skriban raporton pri atendablaj aktivecoj de hungaraj esperantistoj ». En la 80aj jaroj estis esplorite, ĉu ekzistas kontaktoj inter junaj esperantistoj de GDR kaj FRG. En unuopaj kazoj IM-oj tradukis por la Stasio el diversaj Esperanto-gazetoj, precipe dum la tempo de la Praga Printempo kaj okaze de la milita stato en Pollando. Sed, kiel Bendias aldonas kiel konsolon, sekretaj servoj ĉiam interesiĝis pri la agado de sociaj movadoj, ankaŭ en

la Okcidento, menciante ke eĉ Svislando konis sian « Stasian » skandalon en la 80aj jaroj. La komparo estas maladekvata.¹⁸

Resume kaj konklude : La ĉapitro pri la ŝtata sekureco estas sen substanco kaj do en principo seniluziiga, sed la atendoj je ĝi estis verŝajne tro grandaj. La temo do ne estas fintraktita.¹⁹

La rolo de iamaj gvidantoj kaj estroj

La rolo de Detlev Blanke, la iama tre influa sekretario de ZAKE/-GDREA, ludas en la libro de Bendias neniun gravan rolon. Kun la escepto de iu « Leo », kiu esprimis en sia intervjuo kelkajn pli kritikajn vortojn pri li, analiza traktado de la agado (kaj ties sekvoj) de ĉi tiu centra funkciulo mankas grandparte, kvankam certe ekzistus pluraj kritikindaj aspektoj el diversaj vidpunktoj (pri kiuj multaj esperantistoj verŝajne eĉ ne konscias, despli ke Blanke apartenas en la Eo-movado al la t. n. korifeoj). El tio oni povus konkludi, ke kun Blanke ĉio estas en ordo.²⁰ En aparta intervjuo Blanke rakontas pri siaj Esperanto-travivaĵoj

¹⁸ Tiu temo estas traktita de mi en la Svisa Enciklopedio Planlingva (2007).

¹⁹ Cetere, la tuta jura prilaboro de la « GDR-pasinteco » estis en Germanio oficiale finkonkludita antaŭ kelkaj jaroj. Ne ĉiuj punindaj personoj povis esti adekvate punitaj, ĉar mankis la leĝa bazo aŭ multaj akuzitoj ne estis puneblaj, pro alta aĝo, malsaniĝo k. s. Intertempe multaj kazoj jure preskriptiĝis.

²⁰ En 2011 Blanke estis nomita honora membro de UEA.

en la junaĝo kaj kiel li konatiĝis kun diversaj esperantistoj. Dank' al sia rigora sinteno, kiun oni iusence povas konsideri sincera, Blanke konfesas, ke li siatempe *klopodis eviti* (sic) sendependan junularan Esperanto-organizaĵon ekster la Kulturligo. Li klarigis la aferon tiel, ke tia sendependeco certe ne estus plaĉinta al Libera Germana Junularo (FDJ), kiu monopolis, gvidis kaj kontrolis la junularon en GDR. Malgraŭ la parta banaleco de liaj klarigoj, oni povas jam tre bone senti la postan rolon de Blanke en ZAKE/GDREA, kiu celis monopoli kaj kontroli la Esperantomovadon de GDR same kiel tion faris analogaj GDR-instancoj. Apud tio, Blanke pretendas por si la meriton, ke per sia « saĝa konduto » (sic) li kvazaŭ savis Esperanton en GDR. Anstataŭ do preni ekzemple la politikan-ideologian rolon de Blanke sub la lupeon, Bendias sentas ĉefe la bezonon esprimi sian profundan dankemon al d-ro D. Blanke pro ties « longjara kritiko kaj subteno de tiu ĉi verko », kaj aldonas, ke ankaŭ ĉe « diverĝaj vidpunktoj » Blanke « ĉiam estis preta, promocii mian laboron », « donis al mi konsilojn kaj malfermis sian ampleksan privatan bibliotekon ». Estus interese scii pli pri tiu « kritiko » kaj pri kiaj « konsiloj » konkrete temis.²¹

²¹ Cetere, en *der esperantist*, n-ro 1/1990, D. Blanke komplete distanciĝis de la falintaj GDR-ŝtatestroj, deklarante, ke li « ne sciis, ke GDR estis regata de privilegio-avida kliko de krimuloj » kaj ke li « eraris » rilate al tiu « gvidantaro de la partio », kiu « piedtretis la idealojn de la socialismo, misuzis sian potencon kaj fidon de multaj bonvoluloj ». Ĉi tiu en si mem prava sin-

La 80aj jaroj kaj la fino de GDR

Kiel Bendias plue skribas en posta ĉapitro, inter 1985 kaj 1989 ĉe la Esperanto-junularo de GDR estiĝis io kiel tendara etoso. Gorbaĉov vekis ondon de simpatio, « multaj junuloj adiaŭis mense al GDR », tio signifas, ke multaj junuloj frustriĝis kaj seniluziiĝis pri sia ŝtato kaj simple forlasis la landon, en kiu glasnosto kaj perestrojko neniam alvenis. En 1987 GDREA perdis la nervojn kaj malpermesis la novan estraron de la Junulara Komisiono, kiun la junuloj mem elektis. Tio estis la plej lasta grava konflikto kun GDREA, kiu ankoraŭfoje impresis montris sian stalinisman grimacon. Kvankam la junularo estis traktita de GDREA kun certa suspekto kaj neglekto, Bendias notis, ke la junularo sukcesis influi la aferojn tiel, ke GDREA iom mildigis la monopolon (« La junularo estis la sismografo de GDREA », « La junularo ŝanĝis la asocion »). La influo de la revolucia kaj demokratiiga procezo en Orienta Eŭropo kaj ĝia premo en GDR en la dua duono de la 80-aj jaroj estas priskribitaj en la ĉapitro 9.

Tiel, unu generacio de junuloj sekvis la alian. En la libro de Bendias aperas multaj nomoj de junaj « esperantistoj », kiuj neniam estis konataj ekster GDR. Ĉar mankas iliaj biografioj, oni praktike nenion

teno tamen devas esti konsiderata kiel malkredinda kaj absurda, ĉar ĝi estis adoptita tuj post la kolapso de la Honecker-reĝimo ankoraŭ en novembro 1989 de gvida ŝtata funkciulo, kiu estis unu el la plej bone informitaj personoj en GDR, kiu ĉiam plenkonscie elektis siajn vortojn kaj agadojn !

scias pri la sorto de tiuj junaj samideanoj, kiuj havis certajn esperojn je Esperanto, kiuj evidente estis grandparte trompitaj, ĉar en GDR estis iluzio esperi je la plenumiĝo de tiuj revoj. Unu biografio tamen vekas la atenton : Kortuŝas la tragika sorto de Rita Bahalwan (en GDR konita kiel Rita Krips), kiu forlasis sian GDR-hejmon por rekomenci la vivon en Jemeno, kie atendis ŝin nova tragedio.

1989 kaj la sekvoj

Post la falo de la Berlina Muro, en novembro 1989 estis fondita en GDR « La Esperanto-Junularo » (DEJ) – sen la « aŭspicio » de GDREA, sed kun la Ronda Tablo. La nova generacio de gejunuloj ricevis apogon de okcidentgermanaj esperantistoj. Sed baldaŭ komenciĝis novaj konfliktoj, miskomprenoj, kvereloj kaj krizoj. En la plej lasta tago de 1990 DEJ kaj GEJ unuiĝis. En majo 1991 sekvis ankaŭ la unuiĝo de GEA kaj GDREA. Kiel oni povis legi, nur malgranda parto de iamaj GDREA-esperantistoj aliĝis al la tutgermana asocio.²²

En sia libro, Bendias aplikas kompreneman-neŭtralan sintenon kaj kulpigas nenium personon, malgraŭ

²² Ĉi tiu nealiĝemo de la plimulto estas iom nebula afero. Ne estas klare kial nur malmultaj GDREA-membroj aliĝis al GEA. Ĉu enketo inter ili estis farita ? Povas esti, ke inter tiuj 1500-2000 GDREA-membroj troviĝis unuflanke multaj maljunuloj, multaj paperaj membroj kaj personoj, kiuj post la malapero de GDR ne plu aliĝis al iu alia Eo-asocio aŭ entute forlasis Esperanton. Sed tio estas nur miaj supozoj.

ĉio. Sed Bendias ankaŭ ne hezitas esprimi kelkajn kritikajn komentojn kiel la sekvan : « Milionoj da homoj < sufiĉe bone vivis > kun la Stasio kaj aprobis ĝin. Eble ili ankaŭ nun aprobis ĝin, se iu politika sistemo donus al ilia vivo trankvilon, sekurecon kaj firman kadron. Ne nur la reĝimo mem estis maljusta, ankaŭ la homoj estis maljustaj. Multaj tenis sian konformismon fermita ĝis nun. Kelkaj volas pentri GDRn iom pli ĝojige ol ĝi estis, eble por pli bone povi paciĝi kun siaj memoroj kaj sia iama patrujo. » En la antaŭparolo Bendias alvokas la homojn, kiuj ankoraŭ devas prilabori sian pasintecon, ke ili faru tion tute persone sen la peno de aliaj.

La realeco forpuŝis la utopiojn

Intertempe, la utopioj estis anstataŭitaj per la realeco, konstatas la historiema orientgermana sociologo. La ideologioj fiaskis, ne nur la komunismo, sed ankaŭ la kapitalismo troviĝas en profunda krizo; ŝajne venkis la angla lingvo kaj la « okcidentaj valoroj », kiuj estas akompanataj de la nova naciismo, por konduki la homaron en novajn konfliktojn kaj militojn. Ŝajnas ke ankaŭ Esperanto fariĝis la viktimo de la tutmondiĝo aŭ globalizacio. Al la Esperanto-asocioj Bendias riproĉas, ke ili ne kapablis formuli novajn projektojn. Li tute pravas !

GDR ja malaperis, sed memoroj pri ĝia « ĉarmo » restas en formo de spuroj, kiujn postlasis rakontoj pri travivaĵoj kadre de la Esperanto-junulara movado de GDR, ekzemple. Sed se oni nostalgias pri la iama

« ĉarmo » de GDR oni ne forgesu la vivo-esencajn problemojn, kiujn havis milionoj da simplaj kaj senprivilegiaj homoj en la GDR-hejmo, kiu pli similis al prizono ol al feliĉa lando de la baldau alvenonta komunismo, en kiu ankaŭ parto de la esperantistoj kunludis kiel komplicoj de brutala kaj cinika politika sistemo. Se Bendias skeptike perceptas la reunuiĝon de Germanio, oni povas esperi por li kaj lia generacio, ke ankaŭ en la nova hejmo la persona feliĉo estos trovebla, en la konscio, ke malgraŭ ĉiuj nesolvitaj problemoj certe estas pli bone vivi nun ol en ĉiuj pasintaj tempoj de Germanio.

Pere de la « fakaj » « ekskursoj » (temoj ekster Esperanto) en la tre leginda libro de Torsten Bendias oni sentas la klopodon de la aŭtoro montri la Esperanto-movadon en la politika, historia kaj soci(ologi)a kunteksto de GDR kaj orienta Eŭropo. Ĉiuj ĉi ĉapitroj meritis apartan legadon kaj recenzadon, ankaŭ kun la celo atentigi pri kelkajn eraroj kaj malprecizaĵoj.²³ Sed kiel kutime en

²³ Enestas iuj eraretoj kaj malprecizaĵoj: Ekzemple D. L. Armand, pri kiu mankas fontindiko, ne pasigis 18 jarojn en la « lagro », sed precize 18 *monatojn* en la prizono Sokolničeskij izpravdom en Moskvo en la jaroj 1927-29 (laŭ alia fonto 1926-27), cetere laŭ paragrafo 193, 12 pro rifuzo de la armea servo pro religiaj konsideroj (surbaze de la argumentado de Tolstoj). Li ankaŭ ne ludis rolon nur en la 1970aj jaroj, sed jam de post 1956 okaze de la restarigo de la Eo-movado en SU (vidu Арманд Д.: Путь теософа в стране Советов: Воспоминания / Давид Арманд. Moskvo. Аграф 2009. 608 p.). La menciita (nerekta) parencino estis

tiaj meritplenaj libroprojektoj okazoj la aŭtoro donas utilajn stimulojn por pluokupiĝi pri tiuj interesaj temoj.

La librotitolo estas : Torsten Bendias : Die Esperanto-Jugend in der DDR. Zur Praxis und Lebenswelt sozialer Strömungen im Staatssozialismus. LIT. Münster. 2011. 340 paĝoj. Prezo: 49.80 € (UEA), 34.90 € (Lit-eldonejo), CHF 49.20 (bol.ch). La libro estas parte enrigardebla en interreto kadre de Guglaj Libroj.

-oOo-

Reĝustigo

(Andreas Künzli, *Ankoraŭfoje pri René de Saussure*, SES informas, 2/2012, p. 18, lasta alineo.)

Bedaŭrinde lasta korekto de la aŭtoro ne estis efektivigita. Devus esti : « La dua edzino de René de Saussure estis Viola Anna Helena Heer (naskiĝis 19-05-1873, mortis 21-08-1964). Ŝi venis el Zuriko al Berno kaj loĝis en Lombachweg 27, dum René de Saussure mem vivis en Lombachweg 15. » Pardonopeton al la aŭtoro kaj al la legantoj pro tiu manko. (rs)

Inessa Armand Steffen (1874-1920), sekretariino de Lenin.



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand

www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Septembre

1 : La Chaux-de-Fonds : SES-CDELI : Festado de la 125a Esperanto-Jubileo, matene prelegoj en la Biblioteko, posttagmeze koncerto en la Konservatorio.

3 : Lausanne : LES-kunveno kun Nandir-filmoj.

8 : Solothurn : SES-vizito de la dinosaŭraj spuroj en Oberwil kaj sipveturo al Biel.

19 : Wil : EK-kunveno kun lumbildprezento de Barbara Pochanke pri la UK en Vjetnamio.

27 : Basel : ESB-kunveno kun ludoj.

OktoBRE

1 : Lausanne : LES-kunveno.

10 : Redakta datlimo de *SES-informas*.

12-14: Le Louverain (NE) : SES-SFERO.

22 aŭ 29 : Basel : La ESB-kunveno okazas ekde la 19.00 en Saint-Louis.

27 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Novembre

5 : Lausanne : LES-kunveno.

17 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

23 : Basel : ESB-kunveno pri la programo 2013.

Decembre

5 : Wil : EK-kunveno : Rakled-vespero.

15 : Redakta datlimo de *SES-informas*.

15: La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

15 : Lausanne : Zamenhofa festo.

Januare 2013

7 : Lausanne : LES-kunveno.

Februare

4 : Lausanne : LES : Ĝenerala Asembleo.

10 : Redakta datlimo de *SES-informas*.

Marte

23 : Staad (SG) : Ĝenerala Asembleo de SES en la restoracio « Weisses Rössli » sekvata de vizito de la *Markthalle* konstruita de Hundertwasser en Altenrhein.

-oOo-

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

Basel : Esperanto-Societo Basel : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

La Chaux-de-Fonds : CDELI, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claudio.gacond@ne.ch, tel : 032 967 68 42.

CDELI-Studsabatoj : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: nancy.fontannaz@gmail.com tel : 021 728 31 27.

Lausanne : Laŭzana Esperanto-Societo : esperanto@citycable.ch tel : 021 647 29 28.

**Genève : Grupo La Stelo : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1. tel : 022 771 24 37.
kaj Asocio Esperanto-Genève-Régions : esperantoegr@gmail.com**

Wil : Esperanto-Klubo : wolfram@fischer-zim.ch

-oOo-

Atentu ! *La Svisa Kalendaro* videblas aliflanke de tiu ĉi kovrila paĝo

Belaj momentoj dum la kanta restado en Burgonjo



Elisabeth de Mestral dum korusa ekzerco



korusaninoj



kaj korusanoj



Bernard Nicolet alpkornanta



Agrabla paŭzo dum migrado